Julio Cezaro: tragedio en kvin aktoj

Brita Esperantista Asocio

Londono; GBR 1906

JULIO CEZARO

CEZARO

LAMBERT

JULIO CEZARO

JULIO CEZARO.

JULIO CEZARO

TRAGEDIO EN KVIN AKTOJ

DE

W. SHAKESPEARE

TRADUKITA DE

D. H. LAMBERT, B.A. (OXON.)

Fratulo de la Brita Esperantista Asocio

LONDONO:
BRITA ESPERANTISTA ASOCIO
1906

INTERNACIA PRESRAJTO

DE LA

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO.

ANTAŬPAROLO.

Verkinte tiun ĉi tradukon de unu el la plej gloraj tragedioj de Shakespeare, mi kredas bone antaŭklarigi kelkajn punktojn, kiuj min atentigis dum la tradukado. Unue mi celis fari la tradukon *internacia*. Por samtempe konservi simplecon, mi tradukis ankaŭ laŭvorte, kie ajn al mi ŝajnis, ke la senco tiamaniere estos akceptata de tutmonda legantaro. Efektive mi penadis atingi simplan klarigon de la angla teksto tiel, ke, ĉar kelkaj frazoj estas eĉ al anglo, kaj pli al fremdulo, ne facile kompreneblaj, tiuj ĉi povos akiri la plenan signifon, nur sin turnante al la Esperanta traduko. Due, mi esperantigis la nomojn de la personoj kaj la diversajn teknikajn terminojn aŭ titolojn simile al la bonekonataj originaloj, por laŭeble alkonformigi mian al la latina vortradiko, elektinte, ekzemple, 'tribunestroj' por prezenti 'Tribunes,' tribuni, plivole ol 'popolestroj,' popolreprezentantoj, komunulestroj, kaj similajn.

Per tiaj rimedoj mi esperas, ke al mi prosperis konservi la spiriton, forton kaj belecon de la originalo.

Estas preskaŭ neeble esprimi Esperante dusencaĵon. En 'Hamleto' mi rememorigas nur unu okazon kie nia majstro tion provis, nome, en Akto 3, Sc. 1 (sur p. 84 de la Pariza eldono), sed tie ĉi oni rimarkos, ke

la Esperantaj vortoj ĝuste similas al la anglaj: kio faciligas la dusencigon. Tial, kiam ia frazo ŝuldas nur al ducensaĵo sian saŭcon kaj pikilon, mi, escepte en du aŭ tri ekzemploj, juĝis pli saĝe forlasi la frazon netradukitan.

Antaŭ ol plene fini la verkon, mi zorge komparis ĝin kun ekzistantaj tradukaĵoj en la franca kaj itala lingvoj, kaj mi rimarkis, ke al ĉiu lingvo, kvankam naskinta lertajn kaj belajn rezultatojn, tamen mankis la kapableco prezenti, tiel same kiel Esperanto, la neriman versaĵon de Shakespeare. La angla dramaŭtoro, malgraŭ sia laŭnatura kaj korŝiranta prezentado do la morto de Julio Cezaro, la centra okazintaĵo en la mondhistorio,—tamen eraris, farante la Kapitolion la scenejo de la mortigo. La atenta studento rememoros, ke ĝi havis lokon en la teatro de Pompejo—fakto rimarkinda, ke la venkinto pereis en la ĉefa konstruaĵo, kaj antaŭ la statuo mem de la venkito.

Fine, mi deziras plej dankeme konfesi mian ŝuldecon al multaj samideanoj — fremduloj kaj angloj—kiuj tre afable kaj malŝpareme donis al mi la utilon de sia kritiko pri la verko.

D. H. LAMBERT.

AL SINJORO E. BOIRAC

REKTORO DE LA DIĴONA UNIVERSITATO,
LA KOMPETENTA KAJ SENPARTIA PREZIDANTO
DE LA UNUA ESPERANTISTA KONGRESO, 1905,
KAJ AL LIAJ FRANCAJ SAMIDEANOJ,
KIUJ AFABLE KAJ GASTAME AKCEPTIS
LA ANGLAJN ESPERANTISTOJN
EN BULONJO-APUD-MARO,
TIUN ĈI TRADUKAĴON DE TRAGEDIO DE NIA
GLORA ANGLA POETO,
KIEL INTERNACIAN MEMORAĴON, RESPEKTPLENE DEDIĈAS
LA VERKINTO.

JULIO CEZARO.

PERSONOJ:

JULIO CEZARO.

OKTAVIO CEZARO, MARKO ANTONIO, M. EMILO LEPIDO, — *triumviroj post la morto de Julio Cezaro.*

CICERONO, PUBLIO, POPILIO LENO, — *senatanoj.*

MARKO BRUTO, KASSIO, KASKO, TREBONIO, LIGARIO, DECIO BRUTO, METELLO CIMBRO, CINNO, — *konspirantoj kontraŭ Julio Cezaro.*

FLAVIO kaj MARULLO, *tribunestroj.*

ARTEMIDORO el KNIDO, *instruisto de retoriko.*

CINNO, *poeto. Dua poeto.*

LUCILIO, TITINIO, MESSALO, JUNA KATONO, VOLUMNIO, — *amikoj de Bruto kaj Kassio.*

VARRONO, KLITO, KLAŬDIO, STRATONO, LUCIO, DARDANIO, — *servantoj de Bruto.*

PINDARO, *servanto de Kassio.*

KALFURNINO, *edzino de Cezaro.*

PORTINO, *edzino de Bruto.*

Antaŭdiristo.

Senatanoj, urbanoj, gardistoj, sekvantoj, k.c.

La agado havas lokon en Romo dum la tri unuaj aktoj; poste, en la ĉirkaŭaĵoj de Sardiso kaj Filippo.

AKTO I.

SCENO 1.—*Strato en Romo.*

FLAVIO, MARULLO, *kaj amaso da* URBANOJ *venas.*

Flav. For ! hejmen, vi vaguloj, hejmen iru :
Ĉu estas festa tag' ? Ĉu vi nescias,
Ke metiistoj devus ne promeni
Dum tago ordinara sen la signo
De sia profesi' ? Vi kia estas ?
Unua Urb. Sinjoro, ĉarpentisto.
Flav. Do kie estas via mezurilo
Kaj leda antaŭtuko ? Kial vi
Surmetis festvestaĵon ? Haltu tie,
Metion vian diru.

Dua Urb. Mi vere—simile al fabrikeja sklavo—mi estas, por tiel diri, suferisto.

Mar. Sed rekte diru la metion vian.

Dua Urb. Se vi, mastro, de mi petas perditan piedveston aŭ paron da ili, mi povos ilin ripeti aŭ ripari.

Mar. Ĉesigu, petolulo, vian ŝercon,
Klarigu, tuj.
Dua Urb. Mi estas ŝufaristo.
Flav. Sed kial vi en via metiejo
Ne restas? Kial tiujn ĉi urbanojn
Vi promenigas tra la romaj stratoj ?

Dua Urb. Vere, por eluzigi iliajn ledajn plandojn, por ke mi akiru pli da perlaboro. Tamen, mastro, ni nin regalas por vidi Cezaron, kaj por festi lian triumfon.

Mar. Pri kio festi ? kiaj pri venksignoj ?
Kaj kiaj tributuloj lin postmarŝos,

La triumfveturilon ornamontaj ?
Lignaĵoj, ŝtonoj, vi senprudentuloj,
Romanoj senkoremaj kaj kruelaj,
Ĉu vi Pompejon konis ? Kiel ofte
Remparojn, fortikaĵojn vi surrampis,
Fenestrojn, turojn, kaj eĉ domajn pintojn,
Kun infanetoj, kaj sidadis tie
La tutan tagon, ĝoje atendante,
Por vidi la paradon de Pompejo ;
Kaj nur vidante lian veturilon
Ĉu vi ne tiel forte lin salutis,
Ke eĉ Tibero tremis sub la bordoj,
Aŭdante multefoje la resonajn
Hura' ojn ambaŭflanke ripetatajn ?
Kaj ĉu la festvestaĵojn vi surmetis ?
Kaj petis nun ĝojigan libertempon ?
Kaj semis viajn florojn sur la vojon
De l' elverŝinto de Pompeja sango ?
For, for !
Rekuru hejmen, kaj genufleksante
Petegu la diaron, ke kompate
Defendu ili vin de l' pestmalsano,
Maldankemecon tian vizitonta.
Flav. Foriru, samlandanoj, kaj pro tio
Kunmetiistojn viajn kunvenigu,
Alproksimigu ilin al Tibero,
Kaj tien verŝu larmojn ĝis la bordoj
Ekmalaperos sub la akvofluo. [*La* URBANOJ *foriras.*
Jen, la metal' plej kruda ekfandiĝas ;
Kaj la kulpado tuj mutigis ilin.
Malsupreniru ni Kapitolion,
Per dekstra vojo vi ; per la maldekstra
Mi iros ; la idolojn senvestigu,
Se ili estos plene ornamitaj.
Mar. Ĉu al ni tio estas permesita ?
La Luperkala fest' hodiaŭ estas.
Flav. Ne estas grave ; tamen la idolojn
Venksignoj de Cezaro ne ornamu.

Mi dume rapidire malpermesos,
Ke la amas' kuniĝu sur la stratoj.
Kaj ankaŭ vi, se ili trodensiĝos.
Se oni ŝiros el flugil' Cezara
Kreskantajn plumojn, oni lin malhelpos
Forflugi preter la vidpovo homa,
Kaj ĉiam teni nin en terurego. [*Ili foriras.*

SCENO 2.—*Publika Placo.*

Trumpetado. CEZARO *eniras:* ANTONIO *por la kurado;* KALFURNINO, PORTINO, DECIO, CICERONO, BRUTO, KASSIO, *kaj* KASKO: *granda popolamaso sekvas, inter ili* ANTAŬDIRISTO.

Cez. Ho, Kalfurnino!
Kas. Aŭdu vi Cezaron.
Cez. Ho, Kalfurnino!
Kal. Jen mi, via moŝto.
Cez. Alproksimiĝu vi al Antonio,
Kuranta la kuradon. Antonio!
Ant. Jes, via moŝto!
Cez. Tuŝeti Kalfurninon ne forgesu;
La maljunuloj diras, ke virinoj,
Tuŝitaj dum kurado tia sankta,
Malfruktportadon perdas.
Ant. Certe, tio,
Kion Cezar' ordonas, jam fariĝis.
Cez. Antaŭen; kaj nenion preterlasu. [*Trumpetado.*
Antaŭd. Cezaro!
Cez. Kiu vokas?
Kasko. Mutiĝu ĉiu bruo, vi silentu!
Cez. El l' apudestantaro kiu vokas?
Mi aŭdas voĉon, pli ol ĉiuj fortan,
Alvoki min; parolu; mi aŭskultas.
Antaŭd. Atentu pri l' Idusoj martaj.
Cez. Kion?

Bru. Antaŭdiristo petas vin atenti
L' Idusojn martajn.
Cez. Lin al mi konduku.
Kas. Elpaŝu el l' amaso al Cezaro.
Cez. Al mi nun kion diras vi ? Ripetu.
Antaŭd. Atentu pri l' Idusoj martaj.
Cez. Li estas revemulo ; lin forlasu.
[*Muziko. Ĉiuj foriras krom* Bruto *kaj* Kassio.
Kas. Ĉu vi ĉeesti volas ĉe l' kurado ?
Bru. Ne.
Kas. Mi petas.
Bru. Mi ne ludema estas ; al mi mankas
La gajemeco kiun Antonio
Posedas. Mi, Kassio, vian volon
Ne volas kontraŭstari ; mi foriros.
Kas. Vin, Bruto, observante jam de longe,
Mi serĉas vane tiun ĝentilecon
Kaj amon, kiujn vi al mi antaŭe
Montradis ; kaj amiko via kara
Nun trovas nur malvarman singardemon.
Bru. Ne trompu vin, Kassio ; se vizaĝon
Mi iam kovris, tiel mi deziris
Altrudi ne al vi malĝojon mian.
Kontraŭaj sentoj inter si batalis,
Distrante la animon mian, kiuj
En mi difektis eble la konduton.
Sed tio ne amikojn miajn ĝenu,—
El kiuj vi, Kassio, estu unu,—
Nek mian senzorgemon plu rigardu
Alie ol, ke Bruto, al si mem
Severa malamiko, amikaĵojn
Forgesas la kutimajn al aliaj.
Kas. Mi malkomprenis do humoron vian,
Pro kio mia brusto enterigis
Ideojn noblajn, kaj pensadojn indajn.
Ĉu vi vizaĝon vian povas vidi ?
Bru. Kassio, ne ; l' okulo ne sin vidas,
Krom per rebrilo, per eksteraj iloj.

Kas. Tre vere estas ; sed tre bedaŭrinde,
Ke vi ne povas, kvazaŭ en spegulo,
De la indeco via la rebrilon
Ekvidi. Aŭdis mi eminentulojn
Pri Bruto parolantajn, kaj ĝemantajn
Sub la pezega ŝarĝo de la tempoj,
"Se Bruto nur okulojn havus" diri.
Bru. En kiajn vi danĝerojn min kondukus,
Volante, ke mi serĉu, por eltrovi
En mi mem ion, kion mi ne havas ?
Kas. Do, Bruto, pacience min aŭskultu :
Kaj tial, ke vin mem vi povas vidi
Nur per rebrilo, mi, spegulo via,
Senfanfarone montros al vi ion,
De vi ĝis nuna tempo nekonatan.
Pri mi ne estu suspektema, Bruto :
Se mi mokulo estas, aŭ kutimas
Eternan mian fidelecon ĵuri
Kun ĉiu renkontita bona frato ;
Aŭ se vi scias min flatulo esti,
Amanta jen, jen skandalanta, homojn ;
Aŭ se vi scias, ke mi en festenoj
Per babilemo singardemon perdas,
Rigardu do min kiel ne fidindan.
[*Trumpetado kaj ekkrioj post la sceno.*
Bru. Mi timas, ke per tio la Romanoj
Cezaron nomas reĝo.
Kas. Ĉu vi timas ?
Mi do konkludas, ke vi ĝin ne volas.
Bru. Mi ĝin ne volas ; tamen mi lin amas.
Sed kial vi min tie ĉi retenas ?
Kaj kion vi al mi sciigi volas ?
Se ion pri la respubliko, montru
Du vojojn, ĉu l' honoron aŭ la morton,
Sen ŝanceliĝo ambaŭ mi rigardus,
Ĉar ju pli mi honoran nomon amas,
Des malpli mi el ĉio timas morton.
Kas. Mi scias vian econ tiel bone,

Kiel mi konas vian eksteraĵon.
Nu, la honoro estas mia temo:
Pri homa vivo vian opinion
Ne scias mi; sed certe mi preferus
Ne vivi, se mi vivus, eltimante
Similan al mi homon. Mi naskiĝis
Egale kun Cezar' libera: kaj
Vi ankaŭ: ni, nutritaj kiel li,
Elporti povas la malvarmon vintran.
Okazis, kiam blovis la ventego—
Tibero insultanta siajn bordojn—
Cezaro diris "Ĉu kuraĝos ĵeti
Kassio sin en tiun ŝaŭmtorenton
Kun mi, por naĝi tien?" Senprokraste,
Vestite per armaĵo mi ensaltis;
La superakvo muĝis, ni baraktis
Per fortaj brakoj, gin deturnadante
Kaj kontraŭstare eltranĉante vojon.
Sed antaŭ ol atingis ni la celon,
Cezaro kriis "Helpu min, Kassio."
Mi, kiel la propatro nia brava
Eneo el la brilflamanta Trojo,
Anĥison la maljunan foje portis,
Tiele ankaŭ el Tiberaj ondoj
Mi savis la Cezaron lacigitan.
Kaj li fariĝas dio, kaj Kassio
Mizeregulo, kiu devas sin
Kurbigi, se Cezar' lin nur rigardas.
En Hispanuj' lin foje febro prenis,
Kaj pro la spasmo mi lin vidis tremi;
Ho jes, ĉi tiu dio forte tremis;
Forlasis liajn lipojn la koloro,
Kaj tiu mem okulo, kies fulmo
Tremigas la terglobon, lumon perdis.
Ja, tiu lango, kiu nin ordonis
Enskribi libre liajn paroladojn,
Ho ve! ĝi kriis, "donu al mi trinki,"
Kvazaŭ malsanulino. Ho! vi dioj,

Miregas mi, ke malgrandanimulo
Sur la majesta mond' sin potencigas,
Kaj sola palmon portas.
[*Post la sceno oni laŭte salutas kun tamburado.*
Bru. Ha ! ankoraŭ
Mi salutegon aŭdas, kiu montras
Honorojn pluajn al Cezar' donatajn.
Kas. Jes vere, li surrajdas la terglobon,
Kvazaŭ koloso, dum, ni malgranduloj
Sub liaj vastaj kruroj promenadas,
Kaj en la tombon malhonoraj falas.
La homoj unufoje la majstradon
De l' sorto havas, kaj la kulpo sidas
Ne sur la sorta stel', sed sur ni mem,
Ke ni subuloj estas. Prenu ĉiun
El la du nomoj, Bruto kaj Cezaro :
Komparu ilin, via estas bela,
Egale el la buŝ' belsone iras,
Pesite ĝi kun lia egalpezas,
Kaj eĉ sorĉist' spiriton elvokante
Per via ĝin egale aperigus :
Do kial lia nomo pli ol via
Rondiras tra la mondo ? Pro la dioj
Klarigu, kiel kreskis nun Cezaro
Ĝis tiu ĉi amplekso ? kia honto
Al samtempuloj ! Romo, kie estas
Bravuloj viaj ! kiam pasis tempo
Post la superakvego sen herooj ?
Antaŭe kiu povis diri " Viron
Muregoj Romaj unu nur ĉirkaŭas ? "
Nun vere ĝi sufiĉan spacon havas,
Sed kian specon ajn de loĝantaro,
Nur unu solan viron enhavante !
Ho ! ni propatrojn niajn aŭdis diri :
La fama Bruto de antikvaj tempoj
Preferis vidi la diablon mem
En Romo ol renkonti tie reĝon.
Bru. Mi ne suspektas vian veran amon :

Pri via senco iom mi divenas :
Kiom mi jam pripensis tion, kiom
La malbonaĵojn de la nuna tempo,
Mi poste diros ; je la estanteco
Mi volas, kun permes' afabla via,
Vi ne insistu plu. Mi konsideros
Parolojn viajn ; tion, kion plue
Vi diros, mi tre pacience aŭdos
Je la konvena tempo : sed ĝis tiam,
Kassio nobla, tion ĉi meditu :
Preferus Bruto esti vilaĝano,
Ol sin rigardi kvazaŭ fil' de Romo
Sub la kondiĉoj nunaj ŝarĝpezegaj.
Kas. Mi ĝojas, ke paroloj miaj povas
El Bruto eĉ fajreron tian frapi.
Bru. La ludoj ĉesas, kaj Cezar' revenas.
Kas. Manikon tiru de l' pasanta Kasko ;
Kaj vin tre malĝentile li sciigos
Pri la okazintaĵo hodiaŭa.

CEZARO *kaj lia sekvantaro reeniras.*

Bru. Mi tion faros. Sed, Kassio, vidu,
Cezaro sulkiĝantan brovon portas,
Mienon malkontentan la aliaj :
Paliĝis Kalfurnino ; Cicerono
L' okulojn montras ruĝajn kiel fajro,
Elrigardante kiel ni lin vidis,
Kontraŭdiritan de la senatanoj,
Kas. Raportos Kasko, kio lin ofendis.
Cez. Antonio !
Ant. Cezaro !
Cez. Mi ŝatas apud mi la grasajn virojn,
Kaj tiajn kiaj nokte ne maldormas :
Kassio havas la malgrasajn vangojn
De avarulo ; tiajn mi malfidas.
Ant. Ne timu lin, ĉar li fidinda estas,
Nobelo, kaj,—mi kredas—partiano.
Cez. Sed mi volonte vidus lin pli grasan.
Mi lin ne timas ; tamen se Cezaro

Timema estus, li Kassion ol
Aliajn pli evitus. Li legemas:
Observemulo granda estas, kaj
La homajn farojn trarigardas, amas
Ne la teatrojn, kiel vi, muzikon
Aŭskultas ne, malofte ridas, kaj
Eĉ tiam kvazaŭ li sin malestimas,
Ke io ajn lin movos al rideto.
Tielaj sin maltrankviligas ĉiam,
Rigardadante iun pli ol ili
Potencan, kaj danĝerminacaj estas.
Mi al vi ion eltimindan montras,
Ne kion timas mi,—Cezaro ĉiam.
Maldekstre staru,—kaj al mi sciigu
La opinion vian pri Kassio.

[*Trumpetado. Foriras* CEZARO *kaj lia sekvantaro, krom* KASKO.

Kasko. Vi tiris mian mantelon; ĉu vi volas paroli kun mi?

Bru. Jes Kasko, diru, kia okazintaĵo Cezaron malĝojigis.

Kasko. Sed vi kun li ĉeestis, ĉu ne vere?

Bru. Se vere, mi de Kasko ne demandus.

Kasko. Nu, oni proponis al li kronon: kiun proponitan li forpuŝis per la postaĵo de sia mano, tiamaniere; kaj tuj la amaso ĝoje ekkriis.

Bru. Pro kio estis do la dua bruo?

Kasko. Pro la sama kaŭzo.

Kas. Tri fojojn oni kriis, kaj pro kio?

Kasko. Pro la sama kaŭzo.

Bru. Ĉu oni tri fojojn proponis al li kronon?

Kasko. Jes, vere, kaj li forpuŝis ĝin tri fojojn, ĉiam malpli forte, kaj je ĉiu forpuŝo miaj bonaj fratoj ĝoje ekkriis.

Kas. Kiu proponis la kronon?

Kasko. Antonio.

Bru. Priskribu la aferon, bona Kasko.

Kasko. Oni povus pendigi min pli facile, ol mi

povus priskribi ĝin: ĝi estis nura sensencaĵo; Mi ne ĝin atentis. Mi vidis Markon Antonion al li proponantan kronon:—ne veran kronon tamen, sed specon de kroneto,—kaj, kiel mi diris al vi, li la unuan fojon ĝin forpuŝis: sed malgraŭ tio, laŭ mia opinio, li tre deziris ĝin akcepti. Tiam li proponis denove ĝin al Cezaro: tiam li denove ĝin forpuŝis, sed, laŭ mia opinio, li tre kontraŭvole detenis sin akcepti ĝin. Kaj tiam li ĝin proponis la trian fojon: li forpuŝis ĝin la trian fojon: kaj ankoraŭ, kiam li ĝin rifuzis, la popolamaso ĝoje ekkriis kaj aplaŭdis per malpuraj manoj, kaj ĵetis en aeron siajn ŝvitajn ĉapojn, kaj eldonis tiom da malodora spiraĵo, tial ke Cezaro rifuzis la kronon, ke li preskaŭ sufokiĝis; ĉar li svenis kaj falis; kaj miaparte mi ne kuraĝis ridi, timigite, ke mi malfermante la buŝon enhaladziĝu.

Kas. Sed nun, mi petas, ĉu Cezaro svenis?

Kasko. Li falis ĉe la vendejo, kaj mutiĝis, kaj el lia buŝo eliris ŝaŭmo.

Bru. Malsano lia igas lin falema.

Kas. Li ne malsanas; tamen vi, kaj mi,
Kaj bona Kasko estas tre falemaj.

Kasko. Mi ne komprenas tion, kion vi volas diri, sed certe Cezaro falis. Se la kanajlaro ne lin aplaŭdis kaj fajfis, laŭ tio ke li ĝin plezurigis aŭ male,—tiel same, kiel ili kutimas fari kun la ludo de l' aktoroj,—mi ne estas honestulo.

Bru. Kion li diris rekonsciiĝinte?

Kasko. Vere, rimarkinte, antaŭ ol li falis, ke la popolamaso ĝojas pri lia rifuzo de la krono, disŝirante la subveston li petis, ke ili tranĉu al li la gorĝon. Se mi estus metiisto, mi profitus la okazon, alie, sendu min en la inferon kun la friponaro. Tiam li falis. Rekonsciiĝinte, li diris, ke se li estas farinta aŭ dirinta ion ajn malprave, li deziras ke iliaj moŝtoj pensu, ke lia malsano estas la kaŭzo. Tri aŭ kvar knabinoj apud mi ekkriis "Ho ve! bona homo," kaj bonkore pardonis lin: sed ne zorgu pri

ili : se Cezaro mortigus iliajn patrinojn, ili agus tiel same.

Bru. Kaj tio lin treege malĝojigis.

Kasko. Jes.

Kas. Ĉu Cicerono diris ion ?

Kasko. Jes, li paroladis greke.

Kas. Je kiu celo ?

Kasko. Ne, se mi al vi diros tion, mi neniam kuraĝos rerenkonti vin : sed tiuj, kiuj komprenis la sencon ekridetis reciproke, kaj balancis la kapojn : sed miaparte—pri la greka—ĝi estis nekomprenebla. Mi povas al vi diri eĉ pli da novaĵoj ; oni mallaŭdis Marullon kaj Flavion, tial ke ili senvestigis la idolojn de Cezaro. Adiaŭ. Estis ankoraŭ pli da sensencaĵo, sed mi ne rememoras ĝin.

Kas. Ĉu vi volas vespermanĝi ĉe mi hodiaŭ, Kasko ?

Kasko. Ne, mi jam promesis.

Kas. Ĉu vi volas tagmanĝi morgaŭ ĉe mi ?

Kasko. Jes, se mi estos viva, kaj vi tiam deziros min vidi, kaj viaj manĝaĵoj estos manĝindaj.

Kas. Bone : mi atendos vin.

Kasko. Tre bone. Adiaŭ. [KASKO *foriras.*

Bru. Ho, kiel malĝentila li fariĝis !
Li en lernejo estis spritegulo.

Kas. Kaj ankaŭ nun, celante la elfaron
De ia forta nobla entrepreno,
Se eĉ mallertan formon li alprenas.
Malĝentileco estas kvazaŭ saŭco
Por lia sprito, ebligante homojn
Parolojn liajn sane eldigesti.

Bru. Jes, vere. Al mi donu forpermeson :
Se morgaŭ vi kun mi paroli volos,
Al via dom' mi iros, aŭ laŭvole
Ĉe mi prezentu vin, mi vin atendos.

Kas. Ne dubu. Dume pensu pri l' afero.
[BRUTO *foriras.*
Animon noblan havas vi, sed, ŝajne,
Metalo ĝia estas kunforĝebla

Kun io tre malsama: do konvenas
Ke la induloj ĉiam al similaj
Aliĝu; ĉar animfortecon tute
Nedelogeblan kie oni trovos?
Cezaro ne min amas; amas Bruton:
Sed se mi estus Bruto, li Kassio,
Li ne efektivigus sur mi mem
Influon. Nokte, tra fenestroj liaj
Skribaĵojn kvazaŭ de diversaj manoj,
Montrantajn kiom tuta Rom' estimas
La nomon lian, ĵetos mi, malklare
Traktantajn la gloramon de Cezaro:
Kaj poste gardu sin Cezaro; ĉar
Ni lin ŝancelos, aŭ ni mem pereos. [*Li foriras.*

SCENO 3.—*Strato de la sama loko.*

Fulmotondras. Venas de kontraŭaj flankoj KASKO *kun glavo eltirita, kaj* CICERONO.

Cic. Ĉu vi Cezaron hejmen portis? kial
Vi forte spiras kaj l' okulojn rulas?
Kasko. Ĉu vi ne timas, kiam la terglobo
Malfirme ŝanceliĝas? Cicerono,
Mi vidis fulmotondrojn,—la ventegoj
Fortikajn kverkojn fendis, kaj mi vidis
La fierplenan oceanon ŝveli,
Ĵetantan ŝaŭmon je l' minacaj nuboj;
Sed mi neniam, kiel nun, trapasis
Tra fulmotondro vere flamnaskanta.
Aŭ en ĉielo oni ekmilitas
Aŭ la senmortaj dioj kolerante
Detruon sendas kontraŭ la terglobo.
Cic. Sed ĉu vi vidis ion pli mirindan?
Kasko. Sklav'—vi tre ofte estas lin vidinta—
Maldekstran manon levis, kiu flamis,
Simile al torĉaro, sed la mano
Al fajro sensentema ne varmiĝis.

Plie,—mi tenas nun en man' la glavon,—
Apud Kapitolio mi leonon
Kun sulkiĝanta frunt' renkontis, kiu
Min preterpasis; cent virinoj palaj
Kunkolektiĝis en amas', pro timo
Elaliformigitaj, kiuj ĵuris,
Ke viroj flamkovritaj promenadis.
Kaj eĉ la nokta bird' hieraŭ sidis
Je la tagmezo sur la ĉefvendejo,
Terure kriegante. Kiam tiel
Kuniĝas antaŭsignoj, ni ne diru
"Ho! ĉio estas plene komprenebla,"
Ĉar ili ĉiam montras, ke okazos
Aferoj gravaj por la samlandanoj.
Cic. La tempoj havas ja vidiĝon strangan:
Alfaras tamen homoj al okazoj
Signifon, kiun ili ne posedas.
Ĉu venos morgaŭ al Kapitolio
Cezaro?
Kasko. Jes, li Antonion petis
Sciigi vin pri lia ĉeestado.
Cic. Do bonan nokton, Kasko; la ĉielo
Minacas nun.
Kasko. Adiaŭ, Cicerono. [CICERONO *foriras.*

Eniras KASSIO.

Kas. Ho! kiu iras?
Kasko. Mi, Romano.
Kas. Kasko?
Kasko. Trafite bone. Kia nokt' ĉi tiu!
Kas. Al honestuloj nokto tre agrabla.
Kasko. Sed kiam la ĉiel' minacis tiel?
Kas. Nur kiam la homar' kulpiĝis tiel.
Ĉar mi—mi promenadis sur la stratoj,
Min al terura nokto prezentante,
Kaj tiel sen protekto mian bruston
Submetis nudan al la tondra sago;
Kaj kiam fulmostreko el ĉielo

Malrekte saltis, mi min mem starigis
En ĝia trafo kaj brilanta vojo.
Kasko. Sed kial la ĉielon tiel tenti ?
Konvenas, ke per tim' la homoj tremu,
Se la diaro sendas, kiel signojn,
Heroldojn tiajn por mirigi ilin.
Kas. Mallerta estas vi, kaj la viveco
De la spirito, kiun devus montri
Romano, al vi tute mankas, aŭ
Vi ĝin ne uzas. Ja, vi rigardadas,
Paliĝas, kaj surmetas miran veston,
Vidante la ĉielon maltrankvilan :
Sed se la veran kaŭzon vi pripensos
De tiaj fajroj, kaj fantomoj, kial
Petolas la saĝuloj, kaj l' infanoj
Saĝiĝas, kial diferencas birdoj
Kaj bestoj de natur' kutima sia,
Per unu vorto, kial la aferoj
Ĉi tiuj ordinarajn formojn ŝanĝas
En monstrajn, vi eltrovos, ke la dioj
En ilin enspiradis tiajn ecojn,
Por fari ilin avertiloj, kaj
Timiloj antaŭ nekutimaj faroj.
Mi povas, Kasko, nomi al vi viron
Similan al ĉi tiu nokto, kiu
Malfermas tombojn, tondras, fulmas, muĝas,
Simile je l' leon' Kapitolia,
Kaj kiu ne li mem potencas pli
Ol ni, sed nun fariĝis monstra, kaj
Timinda kiel la vidaĵoj strangaj.
Kasko. Ĉu ne Cezaron vi intencas diri ?
Kas. Ne grave ; ĉar Romanoj nun muskolojn
Kaj membrojn havas kiel la prapatroj ;
Sed la animoj de virinoj ilin
Direktas, sub la jugo de timuloj
Kontentajn resti.
Kasko. Jes oni diras, ke la senatanoj
Cezaron kiel reĝon volas nomi :

Kaj li la kronon, kie ajn li estos—
Sed ne en Italujo—ĉiam portos.
Kas. Mi do akrigu tiun ĉi ponardon:
Kassio el sklavec' sin liberigos.
Tiele vi fortigas la malfortajn,
Vi dioj, tiel venkas vi tiranojn:
Nek ŝtona tur', nek bronzfaritaj muroj,
Malliberej', nek fortaj ferkatenoj
Deteni povas la fortanimecon;
Sed vivo, laca pro bariloj tiaj,
Neniam ne laŭvole sin eksigos.
Se tion ĉi mi scias, sciu ĉiuj,
Ke tiraneco ne ekzistas, kiu
Min igos kontraŭvole ĝin suferi.
Kasko. Mi ankau: ĉar ligito ĉiu povas
[*Denove tondras.*
Malliberecon sian neniigi.
Kas. Kaj kial do Cezar' tirano estos?
Li ne de lupo volus ludi rolon,
Se ne Romanoj estus kvazaŭ ŝafoj:
Sed li leono estas kun cervinoj.
Kaj kiu ajn ekbruligonta fajron
Komencas per pajleroj; kia ŝtofo,
Jes, kia mortintaĵo estas Romo,
Nur la nutraĵ' por fari el malnobla
Cezaro lumigilon! Kordoloro,
Min kien vi kondukis? eble mi
Parolas kun sklavecamanto; tiam
Mi tuj respondos. Sed ne sen armiloj
Mi estas, kaj danĝeron malestimas.
Kasko. Kun Kasko, ne mokema babilulo,
Parolas vi. Jen mia mano; zorgu
Pri la nuligo de ĉi tiuj plendoj;
Kaj mi antaŭeniros plej rapide
El ĉiuj.
Kas. Jen kontrakto vera staras.
En vero, Kask', mi jam al mi aligis
Romanojn kelkajn honorindajn, kiel

Partoprenontojn en afero, kie
La gloro kaj danĝero kune staros;
Kaj ili nun sendube min atendas:
Ĉe la peron' Pompeja: tian nokton
Neniu promenadas sur la stratoj;
Kaj la vidiĝo de l' ĉiel' flamanta
Kun nia entrepren' egalkoloras,
Sangema, fulmotondra, kaj terura.

Eniras CINNO.

Kasko. Sed flanken; iu rapidege venas.
Kas. Per la paŝado mi rekonas Cinnon,
Amikon nian. Kien iras Cinno?
Cin. Por trovi vin. Ĉu tiu estas Cimbro?
Kas. Ne, Kasko, kiu estas kunĵurinto
Por nia cel'. Ĉu oni min atendas?
Cin. Mi ĝojas. Dum ĉi tiu nokt' timinda
Kunfratoj kelkaj ĵus strangaĵojn vidis.
Kas. Ĉu oni min atendas?
Cin. Jes, en vero.
Se vi, Kassio, povus nur kunligi
Kun aro nia Bruton!
Kas. Nu, Cinno, prenu tiun ĉi skribaĵon
Kaj metu ĝin sur la pretoran seĝon,
Kaj Bruto ĝin eltrovos; tiun ĵetu
Tra la fenestro lia: tiun ĉi
Alfiksos vi al la statu' antikva
De l' fama Bruto; tion ĉi farinte,
Ĉe la peron' Pompeja nin renkontu.
Ĉu Trebonio kaj Decio Bruto
Ĉeestos?
Cin. Ĉiuj krom Metello Cimbro;
Li iris serĉi vin. Nu, mi rapidos
Laŭ via vol' disdoni la skribaĵojn.

[CINNO *foriras.*

Kas. Al la teatr' Pompeja poste iru.
Ni, Kasko, antaŭ ol tagiĝos, Bruton
Vizitos; ĉar de li la tri kvaronoj

Jam niaj estas, kaj al ni li mem
Elcedos ĉe venonta renkontiĝo.
Kasko. De ĉiuj estas li tre estimata:
Ĉeesto lia, kiel alĥemio,
Ŝajnigos ĉion ajn, per ni ofendan,
Posedi veran virton kaj indecon.
Kas. Tre ĝuste vi valoron lian taksas,
Kaj kiom ni bezonas lin—ni iru,
Ĉar noktomez' jam frapis; frumatene
Vekinte lin, ni nepre lin enskribos.
[*Ili foriras.*

AKTO II.

SCENO 1.—*Romo. La pomarbejo de* BRUTO.

BRUTO *eniras.*

Bru. Lucio, ho!
Per la movado de la steloj mi
Ne povas juĝi ĉu la tag' alvenas.
Kontente mi tiel profunde dormus.
Vekiĝu, ho Lucio! Jen, Lucio!

Eniras LUCIO.

Luc. Ĉu vi min vokis, via moŝto?
Bru. Kandelon metu en studejon mian;
Kaj ekbruligu ĝin; mi volas legi.
Luc. Certege, via moŝto. [*Foriras.*
Bru. Nur per mortigo lia:—miaflanke
Privataj celoj por ataki lin
Ne min instigas, sed publika bono.
Li volas porti diademon: kiom
Naturon lian tio povus ŝanĝi,
Jen staras la problemo. Hela tago
Eltiras la kolubron; piedire
De ĝi ni devas gardi nin. Lin kroni?—
Per tio ni lin armus per pikilo,
Faronta eble al la Ŝtat' malbonon.
Regnestroj tion faras, disigante
Regadon kaj kompaton: pri Cezaro,
Mi ne rimarkis, ke deziroj liaj
Prudenton superregas. Vere estas,
Ke gloramulo ĉiam supreniras
Per humileco, kvazaŭ per ŝtuparo,
Ĝin rigardante dum rampado sia:
Sed fine ĉe la supro alveninte,
Al ĝi li turnas sian dorson, kaj

La nubojn li salutas, malŝatante
La subajn gradojn, kiuj lin utilis:
Cezaro tiel eble—do, malhelpi—:
Kaj, ĉar la plend' ne trovos argumenton
Pro lia sintenado, mi rezonu:
Ke lia nuna pov' pligrandigita
Supermezure kreskus: kaj pro tio
Rigardu lin serpenta kvazaŭ ovo,
Kaj drakkovaĵ' estonta, tial lin
Mortigu antaŭ ol li elŝeliĝos. [LUCIO *reeniras.*

Luc. Kandelo brulas en studejo via.
Serĉante, mi silikon ĉe l' fenestro
Eltrovis tiun ĉi skribaĵon, kiu [*donante leteron.*
Ne kuŝis tie, kiam mi kuŝiĝis.

Bru. Kuŝiĝu vi denove: ne tagiĝis.
Ĉu ne l' Idusoj martaj estos morgaŭ?

Luc. Mi ne scias, via moŝto.

Bru. Serĉu la kalendaron, por sciiĝi.

Luc. Jes, via moŝto. [*Foriras.*

Bru. La meteoroj tra l' aer' flirtante
Brilegas tiom, ke mi povas legi.
[*Disŝiras la koverton kaj legas.*
" Vi dormas Bruto: ho! vekigu vin.
Ĉu Rom', kaj tiel plu, parolu, frapu,
Vi dormas, Bruto, ho! vekigu vin!"
Anoncojn tiajn oni ofte ĵetis,
Kaj mi tralegis ilin.
" Ĉu Rom'," la sencon mi divenas jene:
" Ĉu Rom' sub unu viro devas tremi?"
Propatroj miaj el la Romaj stratoj
Tarkvinon pelis, la fieran reĝon.
" Parolu, frapu, kaj sanigu." Oni
Min petas frapi. Se sanigo sekvos,
Petegon vian, Romo, mi plenumos.

LUCIO *reeniras.*

Luc. Mart' estas dekkvartaga.
[*Oni frapas post la sceno.*

Bru. Tre bone. Oni frapas ĉe la pordo.
[LUCIO *foriras.*
De l' tempo, kiam min Kassio pikis
Cezaron kontraŭstari, mi ne dormis.
De la instig' al sanga entrepreno
Ĝis la plenumo, tuta l' intertempo
Similas al fantaziaĵ' terura
De l' nokto : la prudento kaj la korpaj
Agiloj tiam interkonsiliĝas ;
Kaj la animo homa, kiel regno,
Revolucion kvazaŭ suferadas.

LUCIO *reeniras.*

Luc. Kassio, via frato, ĵus alvenis,
Por vin viziti, via moŝt'.
Bru. Ĉu sola ?
Luc. Ne, kun aliaj.
Bru. Ĉu vi ilin konas ?
Luc. L' oreloj nevideblaj sub ĉapeloj,
Kaj la vizaĝoj, preskaŭ enkaŝitaj
En la manteloj, min malhelpas scii,
Ĉu mi rekonas ilin.
Bru. Ili venu. [LUCIO *foriras.*
La partianoj ! Ho vi konspireco,
Se vi malkovri la minacan brovon
Eĉ en la nokto hontas, vi ne tage
Kavernon trovos, kie via monstra
Vizaĝ' sin maskos. Tial, konspireco,
Ĝin kaŝu per ĝojeco kaj ridetoj :
Ĉar, se vi marŝos ne enmaskigite,
Ne la mallumo densa de Erebo
Vin faros nevidebla.

Eniras la konspirantoj, KASSIO, KASKO, DECIO, CINNO, METELLO CIMBRO, *kaj* TREBONIO.

Kas. Mi vin salutas, Bruto ; sed mi timas
Vin ĝeni je ĉi tiu frua horo.
Bru. Ne, ĉar la tutan nokton mi maldormis.
Ĉu mi ĉi tiujn kunvenintojn konas ?

Kas. Jes, ĉiujn, kaj neniu inter ili
Ne vin honoras ; ĉiu tre deziras
Ke vi vin mem estimu same, kiel
Romanoj la plej honorindaj. Tiu
Ĉi estas Trebonio.
Bru. Estu bone
Veninta.
Kas. Tiu ĉi Decio Bruto.
Bru. Veninta bone estu ankaŭ li.
Kas. Jen, Kasko, Cinno, kaj Metello Cimbro.
Bru. Venintaj bone ili ĉiuj estu.
Sed kiaj zorgoj igas vin maldormaj ?
Kas. Permesu unu vorton.
[BRUTO *kaj* KASSIO *kune parolas mallaŭte.*
Dec. Jen kuŝas l' orient', la tagiĝejo.
Kasko. Ne.
Cinno. Pardonu, jes : kaj tiuj grizaj strioj,
Randigaj al la nuboj, antaŭiras
Taglumon.
Kasko. Ne, vi ambaŭ trompas vin.
Jen estas la sunleviĝej' kontraŭe ;
Ĝi dum la frua parto da la jaro
Kliniĝas al la suda firmamento :
Post du monatoj ĝi la fajrorondon
Prezentas je la nordo : l' oriento
Rigardas rekte la Kapitolion.
Bru. Nu, ĉiuj, donu vi al mi la manojn.
Kas. Kaj ĵuru ni konstantan fidelecon.
Bru. Ne, ne per ĵur' : se la suferoj homaj,
En la vizaĝoj spegulitaj, kaj
La tempa maljusteco ne sufiĉos,—
Se celoj tiuj ĉi malfortaj estos,
Vi maldaŭrigu, ĉiu al la lito ;
Kaj superrega tiranec' surflugu,
Ĝis laŭ la lotoj ĉiu falos. Sed
Se ĉiuj havos tiom da braveco,
Por ekflamigi la timulojn, kaj
Eĉ la virinojn, tiam, samlandanoj,
Instigon kian, krom afero nia,

Por nin pravigi, kian kunligilon
Aliajn ni bezonas, ol Romanojn
Unuanimajn, ne hipokritontajn ?
Kaj kian ĵuron, ol promeson certan
De l' honesteco al la honesteco,
Ke tio staru aŭ ni mem kunfalu ?
Ho, ĵuru pastroj, kaj nefidindeblaj,
La eluzitoj, kaj la suferuloj,
Maljustamantoj : nur la ŝanceliĝajn
Ĵurigu en malbona cel' ; neniel
La senmakulan indon malpurigu
De nia entrepren', la nevenkeblan
Fervoron de spiritoj niaj, per
La pens', ke por l' atingo de la celo
Ni devas ĵuri ; ĉar sangero ĉiu
De kiu ajn Roman' kulpema estos,
Se al li mankos la elplenumado
De tio, kion li promesis.
Kas. Sed ; ĉu ni devus Ciceronon provi ?
Mi pensas, ke li estas partiano.
Kasko. Ni ne ellasu lin.
Cin. Ne, ne, neniel.
Met. Ho jes, enskribu lin ; li, maljunulo,
Ornamos nian celon ĉe l' Romanoj,
Kaj rekomendos ĝin al voĉdonontoj.
Konsilo lia ŝajnos nin influi,
Junecon nian kaj nezorgemecon
La singardemo lia anstataŭos.
Bru. Ne, ne lin nomu, nek pri la afero
Sciigu lin : ĉar li neniam sekvas
Aliajn kondukantojn.
Kas. Lin ellasu.
Kasko. Ĉar li ne estas taŭga.
Dec. Ĉu ni intencas frapi nur Cezaron ?
Kas. Demando saĝa ; nepre Antonio,
L' amiko multamata de Cezaro,
Kun li kunmorti devos : ĉar li estas
Tre lerta intriganto, kaj rimedojn

Li eble trovos, nin malutilontajn
Danĝere ; kion tial por malhelpi,
Kunfalu Antonio kun Cezaro.
Bru. Agado nia ŝajnus tro sangema,
Post senkapigo liajn membrojn haki—
La ago de sovaĝaj enviuloj—
Nur lia membro estas Antonio ;
Ni estu oferantoj, ne buĉistoj,
Ni kontraŭstaras nur spiriton lian,
Ne havas sangon la spirito homa :
Se nur ni la spiriton de Cezaro
Sen lia morto povus pereigi !
Ho ve ! neeble ; sed, amikoj karaj,
Kuraĝe ni mortigu, ne kolere ;
Lin tranĉu kiel dian oferaĵon,
Ne kvazaŭ hundmanĝaĵon lin hakadu.
Kaj, kiel lertaj mastroj, niaj koroj
Incitu la servistojn al venĝaĵo,
Kaj poste ŝajnon de mallaŭdo portu ;
Pro tio oni kredos nin justemaj,
Ne enviemaj ; kaj nin korektintoj,
Ne mortigintoj nomos.
Kaj ne pensadu plu pri Antonio ;
Li estos kvazaŭ brako de Cezaro
Sen lia kapo.
Kas. Tamen mi lin timas ;
Ĉar per amego lia al Cezaro—
Bru. Ho ve, Kassio, ne pri li pripensu :
Se li Cezaron amas, li plej bone,
Mortante por Cezar', kaj saĝe faros ;
Sed ne verŝajne : ĉar li voluptema,
Ludema kaj tre diboĉema estas.
Treb. Ni ne lin timas ; tial li ne mortu ;
Ĉar viva li pri tio certe ridos. [*La horo batas.*
Bru. Kioma horo ?
Ĵus la tria batis.
Treb. Ni devas do disiĝi.
Kas. Ĉu hodiaŭ

Cezaro mem eliros, estas dube;
Ĉar li fariĝis tre superstiĉema,
Kaj opinion ŝanĝis nun pri sonĝoj
Pri fantazioj kaj ceremonioj:
Kaj eble tiuj ŝajnaj antaŭsignoj,
La nekutimaj noktaj terurajoj,
Kaj la konsil' de sonĝoklarigistoj
Retenos lin de la Kapitolio.
Dec. Ne timu ĝin: ĉar tiel decidintan
Mi povos movi lin, al li dirante:
L' aferojn grandajn la malgrandaj venkas,
La arboj pereigas unikornojn,
La ursojn la speguloj, l' elefantojn
Fosaĵoj, la leonojn ŝnuraj retoj,
Kaj homojn la flatuloj; se mi diras,
"Cezaro la flatulojn tre malamas,"
Li, plej flatate, diras "Vere." Tial
Min lasu ĝin aranĝi.
Ĉar mi lin laŭhumore povas trakti,
Kaj mi Kapitolion lin kondukos.
Kas. Ni ĉiuj estu lia sekvantaro.
Bru. Jes, je la oka hor': ne pli malfrue.
Cin. Ne pli malfrue; kaj neniel manku.
Met. Cezaro Ligarion tre insultis
Pro laŭdo de Pompej': Ĉu ne malamo
Facile lin al nia lig' alpuŝos?
Bru. Metello bona, iru lin viziti:
Ĉi tien sendu lin, kaj per rezonoj
Al la afer' mi lin alkonformigos.
Kas. Nun mateniĝas; ni foriros, Bruto.
Amikoj, apartiĝu; sed memoru,
Kaj montru vin Romanoj veraj esti.
Bru. Sinjoroj, elrigardu ĉiuj vigle;
Ne la mienoj nian celon montru,
Sed agu, kiel la aktoroj niaj,
Ne lacigite, kaj per kornobleco;
Pro kio mi salutas kore ĉiujn.
[*Ĉiuj foriras, krom* BRUTO.

Lucio, ho ! li dormas ; mi lin lasu :
La dolĉan roson ĝuu de la dormo :
Nek figuraĵoj vin nek fantazioj
Depremas, kiujn malĝojigaj zorgoj
Desegnas sur la cerboj de la homoj.
Vi do profunde dormas.

Eniras PORTINO.

Por. Nobla Bruto !
Bru. Portino, kion ! kial vi leviĝis ?
Vi sanon vian tre forgesas, tiel
Al la miasmoj de la frumateno
Donante vian delikatan bruston.
Por. Kaj mia Bruto ankaŭ. Malĝentile
Vi el la lit' forŝtelis vin : hieraŭ
Vespere vi subite ekpromenis,
Rigardadante kun falditaj brakoj,
Kaj al mi demandinta, kio estas
Al vi, la frunton sulkiĝantan turnis.
Mi pli insistis, sed gratante l' kapon,
Vi sur la teron per piedo frapis ;
Al mia redemand' vi ne respondis,
Sed balancante kun koler' la manon,
Ekmontris, ke mi vin forlasu ; tion
Mi faris ; ĉar mi timis pliigadi
Malpaciencon vian, ŝajne tro
Ekbruligitan, ĝin konsiderante
L' efikon de humoro, kiu ĉiun
El ni egale kelkafoje regas.
Ĝi ne vin lasas manĝi nek paroli,
Nek dormi : se ĝi vin aliformigus
Ekstere tiom, kiom jam interne,
Mi ne vin konus, Bruto ; kara edzo,
Al mi sciigu vian kordoloron.
Bru. Mi sentas min malsana ; jen la kaŭzo.
Por. Se vere, Bruto saĝe la rimedojn
Alprenus, por atingi resaniĝon.
Bru. Mi tion faras ; kara, do kuŝiĝu.

Por. Ĉu vi malsanas? Ĉu sanige estas
Duonvestite iri, kaj miasmojn
De malseketa frumaten' enspiri?
Ĉu vi malsanas? tamen vin forŝtelas
El la ripoza lito, por ensorbi
Haladzojn la malpurajn de la nokto,
L' abomenindan pestan atmosferon,
Por malsanigi vin? Ne, mia Bruto,
Malsano ia estas de l' spirito
Pri kiu mi, per mia leĝa rajto,
Sciiĝus dece; kaj genufleksante, [*Ŝi genufleksas.*
Per la belec', al vi antaŭe kara,
Per viaj de eterna am' promesoj,
Per tiu sankta ĵuro, kiu nin
Edziĝe unuigis, mi petegas,
Ke vi al mi, duona vi, malkaŝu
La kaŭzon de malĝojo via, kiaj
La viroj, kiuj tie ĉi kuniĝis;
Ĉar kelkaj la vizaĝojn tute kovris
Eĉ en mallum'.
Bru. Levigu vin, aminda
Portino.
Por. Vi aminda Bruto estu,
Kaj mi tuj faros ĝin. Laŭ l' interligo
De la edziĝo, ĉu malpermesitaj
De l' edzo al l' edzin' sekretoj estas?
Ĉu via estas mi laŭmaniere?
Por nur ĉe la manĝado, en la lito
Ĉeesti, kaj interparoli? Ĉu
Mi sentamecon vian nur elvokas?
Se tiel estas, tiam mi de Bruto
Kunamatino estas, ne edzino.
Bru. Edzin' vi estas mia honorinda,
Kaj kara kiel la sangeroj ruĝaj
De mia kor'.
Por. Se tio estus vera,
Mi tiun ĉi sekreton nepre konus.
Konfese mi virino estas; tamen

Virin' kun kiu via moŝt' edziĝis :
Konfese mi virino estas ; tamen
Bonfama, la filino de Katono,
Ĉu vi ne kredas, ke mi ol aliaj
Virinoj plifortiĝis, subtenite
De tia patro, kaj de tia edzo ?
Malkaŝu viajn planojn ; al mi fidu,
Ĉar fortan provon de la konstanteco
Elmontris mi per propravola vundo
En la femuro. Ĉu mi povas tion
Elporti pacience, kaj sekretojn
De mia edzo ne ?
Bru. Ho dioj, faru
Min inda je edzino tiel nobla !
[*Oni frapas post la sceno.*
Aŭskultu ! oni frapas : nun eniru,
Kaj poste mi vin lasos partopreni
En miaj celoj, kaj esperojn miajn
Kompreni per klarigo sen rezervo,
Kaj de malĝojo mia la signifon :
Forlasu min (PORTINO *foriras*). Lucio, kiu frapas ?

Reeniras LUCIO *kun* LIGARIO.

Luc. Jen, malsanulo venas vin viziti.
Bru. Ha, Ligario, kiun Cimbro nomis.
Do, flanken, knab'. Ĉu Kajo Ligario ?
Lig. Mi vin salutas per malforta lango.
Bru. Ho, tro kuraĝe venas malsanulo
Veter' en tia ; multe mi bedaŭras.
Lig. Mi sana estas, se nur Bruto volas
Ekspluatindan ion entrepreni.
Bru. Mi estus preta tion primediti,
Se nur vi povus sane ĝin aŭskulti.
Lig. Nun, pro la dioj, kiujn Rom' adoras,
Malsanon mi deĵetas ! Roma koro !
De sango honorinda deveninta !
Vi, kiel ekzorcisto, elvivigis
Spiriton mian. Nur ordonu min,

Mi neeblaĵojn eĉ kontraŭbatalus ;
Kaj ilin venkus. Kion vi deziras ?
Bru. Ion resanigontan malsanulojn.
Lig. Ĉu ni ne kelkajn devus malsanigi ?
Bru. En vero, kaj irante mi klarigos
Pri tiu ĉi afero grava, kiujn
Ni devos resanigi.
Lig. Nu, antaŭen :
Kaj mi refortigite vin postsekvos,
Por fari mi ne scias kion ; tamen
Nur Bruto min konduku.
Bru. Sekvu do. [*Ili foriras.*

SCENO 2.—*Salono en la palaco de* CEZARO.

Fulmotrondro. Eniras CEZARO *en nokta vesto.*

Cez. Nek tero nek ĉielo pace restis :
Trifoje Kalfurnino dum dormado
Ekkriis, " Helpon al Cezaro ! oni
Mortigas lin ! " Ĉu iu estas tie ?

Eniras Servanto.

Serv. Via moŝto !
Cez. Ordonu al la diservistoj ke
Oferu ili kaj al mi sciigu
La rezultaton.
Serv. Certe, via moŝto. [*Foriras.*

KALFURNINO *eniras.*

Kal. Cezaro, kion vi intencas ? Mi
Hodiaŭ ne permesos vin eliri.
Cez. Jes, mi eliru : ĉar danĝeroj ĉiam
Post mi prezentas sin ; kaj, rigardante
Vizaĝon mian, ili neniiĝis.
Kal. Ceremonioj, kiujn mi malŝatas,
Nun min timigas. Estas viro, kiu,
Krom la aferoj de ni mem viditaj,

Rakontas teruraĵojn ĉe l' posteno.
Sur strato leonino naskis idojn ;
El tomboj malfermitaj sin mortintoj
Ellevis ; kaj fieraj militistoj
Kruele sur la nuboj ekbatalis,
Eskadre, vice, kaj batalione,
Sangŝprucigantaj la Kapitolion ;
Batala tondro supre elbruegis,
Ĉevaloj blekis, kaj mortantoj ĝemis ;
Fantomoj sur la stratoj ekkriegis ;
Cezaro, tiajn nenaturajn signojn
Mi multe timas.
Cez. Tion oni devas
Elporti, kion senmortuloj volas.
Mi volas iri. Tiaj mirindaĵoj
L' amason kun Cezar' egale tuŝas.
Kal. Sen astraj signoj malriĉuloj mortas ;
Ĉielo mem proklamas morton reĝan.
Cez. Timul' mil fojojn mortas antaŭ morto ;
Nur unu morton spertas la bravulo.
El ĉiuj mirindaĵoj al mi ŝajnas
Plej strange, ke la homoj timas tion :
Ĉar morto, fin' neevitebla, venos
Aŭ frue aŭ malfrue.

Reeniras Servanto.

Kion diras
La signoklarigistoj ?
Serv. Ili volas,
Ke vi hodiaŭ ne eliru, ĉar,
De besto eltirante l' internaĵon,
Ne povis ili tie koron trovi.
Cez. La dioj tion faras, por hontigi
Timulojn ; se Cezar' pro timo restus
En hejmo, estus li senkora besto.
Danĝero scias, ol danĝero mem
Cezaro estas multe pli danĝera :
Ni estas du leonoj kunnaskitaj,

Mi la pliaĝa kaj la pli terura;
Cezaro do eliru.
Kal. Ne eliru,
Prudento via estas tro memfida.
Ke mia timo vin retenas, pensu.
Al senatejo Markon Antonion
Ni sendu, kiu vian forestadon
Klarigu pro malsano; lasu min
Sur la genuoj tion de vi peti.
Cez. Mark' Antonio mian malsanecon
Priplendu, kaj pro vi mi hejme restu.

Eniras DECIO.

Ho, jen, Decio: li al ili diru,
Dec. Saluton! bonan tagon, ho Cezaro,
Mi venas vin konduki senatejon.
Cez. Vi trafas oportune la okazon
Saluti miaparte la senaton
Dirante ke ĉeesti mi ne volas:
"Ne povas," "ne kuraĝas," estus ambaŭ
Malveraj; diru do, Decio, ke
Hodiaŭ mi *ne volas* iri tien.
Kal. Malsano, diru—
Cez. Ne Cezar' mensogu,
Ĉu mi, venkinto, tian povon havas,
Kaj tamen mi la veron timas diri
Al grizbarbuloj? Diru, mi ne volas.
Dec. Cezaro plej potenca, pri la kaŭzo
Sciigu min, ke oni ne min moku.
Cez. La kaŭzo estas sole mia volo:
Sufiĉu tio al la senatanoj.
Pro via tamen propra kontentiĝo,
Amante vin, mi volas pli klarigi:
Edzino mia igas min restadi.
En sonĝo ŝi statuon mian vidis:
Kvazaŭ fontano kun cent ŝprucigiloj
Ĝi verŝis puran sangon, kaj bravegaj
Romanoj multaj ridetante banis

La manojn en la fluo: tion ŝi
Almetis al miraklaj antaŭsignoj
De malbonaĵoj okazontaj, kaj
Insiste petis, ke mi hejme restu.
Dec. De l' sonĝ' maltrafis oni la signifon;
Ĝi antaŭdiras ian feliĉaĵon;
Statuo via, sangon fluigante
El multaj fontoj, kies en rivero
Romanoj multaj banis sin, elmontras,
Ke per vi granda Rom' ensorbos sangon
Revivigantan, kaj insiste petos
Emblemojn sangkolorajn, kiel signojn
De amo al Cezaro. Tian havas
Signifon ŝia sonĝo.
Cez. Kaj tre bone
Vi ĝin al mi klarigas.
Dec. Kaj konforme
Al tio, kion mi dironta estas:
Sciiĝu; la Senato jam decidis
Hodiaŭ al Cezar' donaci kronon.
Sed se Cezaro ne ĉeesti povos,
Intenco ĝia eble ekŝanĝiĝos,
Kaj estus tre ridinde, se ĝi dirus
"Disigu la senaton nun, ĝis kiam
La sonĝoj pliboniĝos de l' edzino
Cezara!"
Se sin Cezaro kaŝos, ĉu ne ĝi
Murmuros inter si "Cezaro timas"?
Pardonu min, Cezaro; mia amo
Pri sorto via timas, kaj prudento
De l' amo elparolas la ordonojn.
Cez. Mi hontas, Kalfurnino, ke mi cedis;
Ĉar via timo ŝajnas nun sensenca.
Alportu mian robon,—mi ekiras.

Eniras PUBLIO, BRUTO, LIGARIO, METELLO, KASKO, TREBONIO, *kaj* CINNO.

Ho, jen Publio venas min konduki.
Pub. Cezaro, bonan tagon.

Cez. Ho, Publio,
Veninta bone estu; kaj vi, Bruto,
Leviĝis tiel frue! Bonan tagon
Al Kasko. Al vi, Kajo Ligario,
Cezar' ne estis tiom malamika
Kiom la febro, kiu vin atakis.
Kioma horo?
Bru. Jam la oka batis.
Cez. Mi dankas vin por via ĝentileco.

Eniras ANTONIO.

Jam Antonio, la noktfestenanto,
Leviĝis. Antonio, bonan tagon.
Ant. Kaj al Cezaro ankaŭ.
Cez. Nun preparu;
Mi mallaŭdinde lasis vin atendi.
Vi Cinno; vi Metello; Trebonio,
De vi mi petas interparoladon;
Memoru do viziti min hodiaŭ:
Proksima estu, ke mi ne forgesu.
Treb. Plezure,—(*flanken*) tiel al Cezar' proksima
Ke liaj geamikoj ĝin bedaŭros.
Cez. Eniru ĉiuj, ke mi vin regalu;
Kaj ni, amikoj, volas iri kune.
Bru. (*flanken*) Ho, kiom mi sopiras pro la penso,—
Internon ne prijuĝi laŭ ekstero.
[*Ili foriras.*

SCENO 3.—*Strato apud la Kapitolio.*

Eniras ARTEMIDORO, *legante paperon.*

Art. "Cezaro, gardu vin de Bruto: atentu pri Kassio; ne alproksimiĝu al Kasko; observu Cinnon; ne fidu al Trebonio; tenu viajn okulojn sur Metello Cimbro; Decio Bruto ne vin amas; vi maljuste agis kontraŭ Kajo Ligario. Ĉiuj ĉi viroj estas unuanime kontraŭuloj de Cezaro. Se vi ne estas

senmorta, ĉirkaŭrigardu: sendanĝereco cedas al konspireco; la potencaj dioj vin defendu! Via amanto, Artemidoro."
Jen, kvazaŭ unu el petantoj liaj,
Mi tion al Cezaro volas doni,
Tre kortuŝite, ĉar envio ĉiam
La postesignojn de la virto sekvas.
Cezaro legu tion ĉi kaj vivu:
Se ne, la sorto helpos perfidulojn. [*Foriras.*

SCENO 4.—*Alia parto de la sama strato, antaŭ la domo de Bruto.*

Eniras PORTINO *kaj* LUCIO.

Por. Lucio, kuru al la Senatejo;
Ne haltu por demandi, vigle for!
Ĉu vi ankoraŭ haltas?
Luc. Pro sciigo.
Por. Mi volus, ke vi iru kaj revenu,
Dum mi klarigi povas mian volon
Ho konstanteco, nun fortigu min,
Barilon metu inter mia koro
Kaj lango! mi animon viran havas,
Virinan forton. Kiel malfacile
Al la virino teni la sekretojn!
Vi tie ĉi ankoraŭ?
Luc. Kion volas
La sinjorino? Ke Kapitolion
Mi iru kaj revenu,—plu nenion?
Por. Certigu, ĉu mienon bonan havas
La mastro, ĉar ne sana li eliris;
Observu bone ankaŭ, kion faras
Cezaro, ĉu petontoj lin ĉirkaŭas.
Aŭskultu—kio estas?
Luc. Mi nenion
Ekaŭdas, sinjorino.

Por. Sed aŭskultu ;
Mi aŭdas la batiĝon de batalo,
Portatan vente de l'Kapitolio !
Luc. Sed mi nenion aŭdis.

Eniras la ANTAŬDIRISTO.

Por. Ĉi tien, maljunul' ; vi kien iris ?
Antaŭ. Al mia propra domo.
Por. Kioma hor' ?
Antaŭ. La naŭa, sinjorino :
Por. Ĉu ĉe l' Kapitoli' Cezaro estas ?
Antaŭ. Ankoraŭ ne. Mi iros por lin vidi,
Al la Kapitolio vojirantan.
Por. Vi volas ion peti de Cezaro.
Antaŭ. En vero, sinjorino, se Cezaro
Bonvolos pro si mem aŭskulti, mi
Petegos lin atenti pri si mem.
Por. Ĉu vi malbonon timas kontraŭ li ?
Antaŭ. Mi scias ne la certon, nur la eblon.
Adiaŭ. Estas tie ĉi mallarĝa
La strato : kaj l' amas' de senatanoj,
Pretoroj, kaj petontoj ordinaraj,
Sekvante post Cezaro, elpremegi
La vivon povos preskaŭ el fortulo.
Mi tuj elektu lokon pli liberan,
Por vidi, kaj paroli, kun Cezaro. [*Li foriras.*
Por. Mi devas iri. Ve, ho ve ! senforta
La koro de virino estas ; Bruto,
La dioj benu vian entreprenon !
La knabo certe aŭdis—Bruta peto
Malplaĉas al Cezaro. Ho ! mi svenas.
Forkuru, knabo, kaj de mi salutu
Sinjoron mian ; mi tre ĝojas, diru,
Kaj al mi poste portu la respondon. [*Ili disiras.*

AKTO III.

SCENO 1.—*Romo. Antaŭ la Kapitolio; la Senato sidas supre.*

Popolamaso; inter ili ARTEMIDORO *kaj la* ANTAŬDIRISTO. *Trumpetado. Eniras* CEZARO, BRUTO, KASSIO, KASKO, DECIO, METELLO, TREBONIO, CINNO, ANTONIO, LEPIDO, POPILIO, PUBLIO, *kaj aliaj.*

Cez. (*al la* ANTAŬDIRISTO). L' Idusoj martaj estas jam venintaj.
Antaŭ. Cezaro, jes, sed ne pasintaj.
Art. Saluton, Cezaro; tralegu tiun ĉi petskribon.
Dec. Jen, Trebonio vin humile petas
Laŭ temp' libera lian peton legi.
Art. Cezar', unue mian legu; mia
Rilatas pli proksime mem Cezaron.
Cez. Kaj tial ĝi la lastan lokon havos.
Art. Ho, ne prokrastu; sed ĝin tuj tralegu.
Cez. Ĉu li freneza estas?
Pub. Flanken, flanken!
Cez. Ĉu vi insistas peti sur la strato?
Kapitolion venu.

CEZARO *eniras en la Kapitolion, la aliaj sekvas: ĉiuj Senatanoj leviĝas.*

Pop. Sukcesu via entrepren' hodiaŭ!
Kas. Sed kion vi aludas?
Pop. Nu, adiaŭ.
[*Alpaŝas al* CEZARO.

Bru. Ĉu Popilio Leno volas ion ?
Kas. Al nia entrepren' sukceson plenan.
Ho ve ! se oni scias nian celon—
Bru. Rigardu, li alpaŝas al Cezaro.
Kas. Rapidu, Kasko, pro la timo ke,—
Ho Bruto, kion fari ? se eltrovo
Malhelpos—aŭ Kassio aŭ Cezaro
Mortiĝos, mi per mia propra mano.
Bru. Ne ŝanceliĝu : ĉar pri nia celo
Ne Popilio Leno priparolas ;
Li ĝojan la vizaĝon portas kaj
Cezaro trankviliĝas.
Kas. Trebonio
Profitas la okazon, Antonion
Forkondukante.
[*Foriras* ANTONIO *kaj* TREBONIO.
Dec. Kie Metello estas ? Li baldaŭe
Proponu sian peton al Cezaro.
Bru. Li apudestas ; iru, lin subtenu.
Cin. Vi, Kasko, levos la unuan manon.
Cez. Ĉu ĉiuj estas pretaj ? Kio estas
Malrekta, kion devus reordigi
Cezar', kaj la Senato ?
Met. Plej potenca
Cezaro, estiminda, kaj plej alta,
Metello Cimbro antaŭ via trono
Humilan koron ĵetas,— [*Genufleksante.*
Cez. Ne, Metello,
Ĉi tiuj kurbiĝad' kaj humilaĵoj
Flatecamantojn povas fierigi,
Kaj igi la dekretojn de regnestroj
Ŝanĝiĝaj, kiel la kapric' infana.
Ne pensu, ke l' Cezara severeco,
Simile al glacio, fluidiĝos
Per la influo de la varma spiro
De malsaĝuloj ; nome, dolĉaj vortoj,
La terrampado, kaj malaltaj agoj
De manlekanta hundo. Via frato

Jam estas per dekreto ekzilita
Se vi por li min flatos, kaj petegos,
Mi vin repuŝos kiel hundon. Sciu,
Cezaro nek maljuste agas, nek
Li sen rezonoj bonaj kontentiĝos.
Met. Ho ! ĉu ne estas voĉo pli alloga
Ol mia, por petegi, ke Cezaro
Revoku el ekzilo mian fraton ?
Bru. Mi kisas vian manon, ho Cezaro,
Sed ne flatante, sole, ke Publio
Ricevu forpermeson de ekzilo.
Cez. Ha ! Bruto !
Kas. Ho Cezaro, min pardonu.
Kassio humilege sin inklinas,
Por peti por Publio liberecon.
Cez. Mi, se mi estus kiel vi, ekcedus ;
Min, se mi povus peti, peto movus ;
Sed pro la konstanteco mi similas
Je l' norda stel', al kies senmovado
Ne staras egalulo en ĉielo,
En kiu brilas fajroj grandanombre,
El kiuj ĉiu al la sfer' lumigas,
Sed unu sola tenas sian lokon :
Tiele la terglob' homplena estas,
Kaj homoj la prudenton dian havas ;
Sed mi nur unu solan konas, kiu,
Neatakebla, sur la voj' eltenas,
Sen maltrankvilo : ke mi estas tiu,
Mi montru eĉ en jena maniero :
Konstanta ke Publio ekziliĝu,
Konstanta pri l' ekzilo mi restadas.
Cin. Cezar',—
Cez. For ! Vi Olimpon volus movi !
Dec. Cezaro,—
Cez. Vane Bruto genufleksas.
Kasko. Al mi, ho, helpu !
[*Unue* KASKO, *poste la aliaj konspirantoj, kaj* MARKO BRUTO, *ponarde frapas* CEZARON.

Cez. *Et tu, Brute!* Falu do Cezaro! [*Mortas.*
Cin. Ho Libereco! mortis la tirano!
For, ĝin proklamu ĉie tra la urbo.
Kas. Aliaj ĉe l' tribunoj ekproklamu
"Frateco, libereco, voĉdonado!"
Bru. Urbanoj, Senatanoj, ne timiĝu;
Ne iru for: la kont' saldita estas
De l' gloraminto.
Kasko. Al tribuno, Bruto.
Dec. Kassio ankaŭ.
Bru. Kie nun sin trovas
Publio?
Cin. Konfuzita de l' ribelo.
Met. Vin forte kunstarigu, kaj atentu,
Ĉu ia partiano de Cezaro—
Bru. Ne priparolu tion. Trankviliĝu,
Publio; oni ne al vi intencas
Malbonon, nek al kia ajn Romano.
Sciigu ĉiujn.
Kas. Nun forlasu nin,
Publio; pro la timo ke l' amaso
Vin ekscitite kun ni mem ataku.
Bru. Jes, kaj neniu pri la far' respondu
Krom la farintoj.

Reeniras TREBONIO.

Kas. Kie Antonio
Nun estas?
Tre. Kuris hejmen mirigite,
Ĉar viroj, kaj edzinoj, kaj infanoj
Rigardas, ekkriegas, kaj diskuras,
Kvazaŭ la lasta tago devus veni.
Bru. Ho Sorto, l' estontecon ni atendas:
Ni scias, ke ni mortos: sed la kiam,
Kaj vivplilongigeco homojn premas.
Kas. Nu, kiu mallongigas sian vivon
Je dudek jaroj, mallongigas tiom
Da tempo por morttim'.

Bru. Konfesu tion,
Kaj tiam estas mort' bonaĵ' : ni do
Amikoj estas al Cezar', la tempon
De lia tim' pri morto' ĉesiginte.
Vin klinu, ho Romanoj, kaj ni banu
La manojn en la sango de Cezaro
Ĝis la kubutoj, kaj la glavojn ŝmiru :
Kaj elmarŝante eĉ al la vendejo,
Svingante niajn ruĝajn batalilojn,
Ekkriu kune "Paco, Libereco!"
Kas. Vin klinu tuj kaj lavu. Estontece
Ĉi tiun scenon oni prezentados
En regnoj kaj en lingvoj naskiĝontaj!
Bru. Kaj ofte per la ludo de aktoroj
Cezaro, nun kuŝante senzorgate
Pompeja ĉe l' statuo, resangados!
Kas. Kaj tiam oni nomos nian aron
De la patrujo la liberigintoj.
Dec. Ĉu ni elirus?
Kas. Vere, ĉiu viro:
Antaŭen Bruto; kaj kalkanojn liajn
La plej kuraĝaj kaj plej noblaj sekvos.
Eniras Servanto.
Bru. Ho! kiu venas? De Mark' Antonio
Amiko.
Serv. Tiel li al mi ordonis
Saluti vin sur la genuoj; kaj
Por li la jenajn vortojn elparoli :
Vi, Bruto, vere nobla, saĝa estas,
Honesta, brava; kaj Cezaro estis
Potenca, kuraĝulo, kaj amema;
Mi amas Bruton, kaj mi lin honoras;
Cezaron mi honoris, timis, amis.
Se Bruto lasos do, ke Antonio
Senriske venu, kaj klarigos, kion
Cezaro faris por meriti morton,
Ne tiom Antonio la mortinton,
Kiom la vivan Bruton amos; sed

De nobla Bruto sekvos la aferojn
Fidele tra la duba estonteco.
Jen kion mia mastro volas diri.
Bru. La mastro via saĝa kaj maltima
Romano estas. Pro honoro mia,
Se al li plaĉos veni vidi min,
En sano li foriros, kaj mi nepre
Lin kontentigos.
Serv. Li ĉeestos baldaŭ. [*Foriras.*
Bru. Mi kredas, ke ni faros lin ligano.
Kas. Mi tre deziras : sed pri li timema
Mi trovas min : kaj mi posedas ĉiam
Pri la okazontaĵo antaŭsenton.
Bru. Jen Antonio. [*Reeniras* ANTONIO.
Mi salutas vin.
Ant. Cezar' potenca. Ĉu vi kuŝas tie ?
Ĉu viaj venkoj, gloroj kaj triumfoj
Plimalvastiĝis tiel ? Ha ! adiaŭ.
Mi tute ne, sinjoroj, scias kion
Intencas vi, nek kiu malsanulo
Sangadi devas : se mi mem, ne estas
Hor' tiel taŭga kiel tiu, kiam
Cezaro mortis, nek egalvaloras
Armil' al glavoj viaj riĉigitaj
Per la plej nobla sango en la mondo.
Se kontraŭ mi malamikaĵon ian
Vi nutras, nun, dum viaj sangpentritaj
Gutetas manoj, finu vian agon.
Ne post mil jaroj tiel mi pretiĝus
Por morto, kiel nun ; nenia loko,
Nenia il' de mort' por mi konvenus
Pli ol ĉi tiuj,—jen mi falus apud
Cezaro, kaj de vi ekzekutite,
La regnestranimuloj de l' centjaro.
Bru. Ne petu, Antonio, vian morton
De viroj, kiuj ŝajnas nun sangemaj—
La ago per la ruĝa man' videbla—
Vi nur la manojn tamen vidas, kaj

La sangan faritaĵon : niajn korojn,
Kiel ajn kompatemajn, vi ne vidas :
Kaj la kompato por malsanoj Romaj—
Fajr' fajron pelas, kaj kompat' kompaton—
Cezaron igis l' oferaĵo. Tamen
Por vi malakraj estas niaj glavoj,
Kaj niaj brakoj, sen malica forto,
Kaj niaj koroj, plenaj je bonvolo,
Kun frata ĝentileco vin enhavas.
Kas. Kun nia voĉo via egalpezos
Pri la disdono de honoroj novaj.
Bru. Atendu nur ; kaj post la trankviligo
De la amaso, pro la tim' delira,
Al vi ni montros la rezonojn, kial
Amante ni Cezaron tamen frapis.
Ant. Pri via saĝ' mi estas ne dubema.
Kaj ĉiu do al mi la manon donu :
Mark' Bruto, vian mi unue premas ;
Kaj poste vian manon, ho Kassio ;
Decio Bruto, kaj Metello, viajn ;
La lastan sed neniel malplej karan,
Ho Trebonio, vian. Ve, ho ve !
Sinjoroj ; kion mi parolos ? Tiel
Honoro mia nun malrekte staras,
Ke via takso pri valoro mia
Proklamos—aŭ timulo aŭ flatulo—
Cezaro, mian amon vi elkonis ;
Se do spirito via nin rigardas,
Ĉu ne ĝi vin doloros pli ol morto,
Ekvidi Antonion nun premantan
La manojn de la malamikoj viaj,
Noblulo, antaŭ via propra korpo ?
Se mi nur tiom da okuloj havus
Por verŝi larmojn, kiom vi da vundoj
Por sangi, multe pli al mi konvenus,
Ol kontraŭulojn viajn pace trakti.
Juli' ! pardonu ! Jen vi turnis vin,
Por frapi kvazaŭ cervo inter hundoj,

Jen falis ; jen ĉasistoj viaj staras,
Partoprenintoj en la sanga ludo.
Vi, mond', arbar' al tiu cervo estis,
Li, viva, tenis vin al sia servo.
Simile al ĉasbesto nun li kuŝas
Frapite de reĝidoj.

Kas. Antonio—

Ant. Pardonu min, Kassio : tion diros
La malamikoj de Cezaro ; tial
Ĝi estas modereco por amiko.

Kas. Cezarlaŭdadon mi al vi reproĉas
Neniel, Antonio, sed per kia
Interligilo vi kun ni konsentos ?
Ĉu ni vin nomos en la amikaro,
Aŭ ni sen vi antaŭenvojirados ?

Ant. Pro tio mi kun vi kunigis manojn,
La vido tamen de l' Cezara korpo
Min igis forgesema pri l' afero.
Amiko via, mi vin ĉiujn amas,
Nur atendante la rezonojn, kial
Cezaron vi kalkulis danĝeriga.

Bru. Alie estus nura sovaĝeco
Ĉi tio ; la rezonoj estas tiel
Konsiderindaj, ke se eĉ vi estus
Fil' de Cezaro, restus vi kontenta.

Ant. Nenion plu mi petas, krom permeso
Sur la vendej' kuŝigi lian korpon ;
Kaj el tribun', laŭ rajto de amiko,
Ĉe la funebro fari paroladon.

Bru. Vi faros tion.

Kas. Bruto, unu vorton.
(*flanken kun* BRUTO) Vi faras vi ne scias kion ; ne
Permesu ke parolu Antonio
Ĉe la funebro : ĉu vi scias kiom
L' amas' moviĝos per paroloj liaj ?

Bru. Pardonu ; mi unue supreniros
En la tribunon, kaj rezonojn montros
Pri l' morto de Cezaro : tion, kion

Parolos Antonio,—mi klarigos,—
Li nur parolas, de ni permesite,
Kaj ke Cezaro per permeso mia
Ricevos leĝan ceremoniaron.
Ĉi tio nin utilos ĉe l' amaso.
Kas. Mi ne aprobas ĝin : al mi ne plaĉas.
Bru. La korpon de Cezaro, Antonio,
Forportu nun. Dum via parolado
Funebra vi ne devas nin insulti,
Sed kiel eble plej vi povos laŭdi
Cezaron, kaj konfesi, ke vi faras
Ĝin pro permeso nia ; vi alie
Ne devas en l' afero partopreni :
Post mia parolado vi parolu
El la tribuno, kien nun mi iras.
Ant. Tiele estu ; pli mi ne deziras.
Bru. Pretigu do la korpon, kaj nin sekvu.
[*Ĉiuj foriras krom* ANTONIO.
Ant. Sensanga argilaĵo, min pardonu,
Traktantan malsovaĝe sovaĝulojn.
Restaĵ' vi estas de l' plej nobla viro,
La ĉefmaristo de la Tempa maro.
Formortu kiuj verŝis tiun sangon !
Mi antaŭdiras super viaj vundoj—
Petantaj, kiel buŝoj senparolaj,
Ke mi pro ili kortuŝante plendu,—
Jen, malbenaĵo frapos la homaron,
Malamikeco regos, kaj la urboj
Italaj reciproke ekbatalos ;
Sangamo kaj mortigo pligrandiĝos,
Kaj tiel kutimiĝos teruraĵoj,
Ke la patrinoj ridetante vidos
Kruele mortigatajn la infanojn ;
Kompaton elforigos sangavido :
Kaj la spirit' venĝema de Cezaro,
Je sia flank' Ateon kondukante
Varmegan de la flamoj de l' infero,
Ĉi tie per imperiestra voĉo

Kriante 'Buĉu,' la militajn hundojn
Ellasos : kaj la krim' malbonodoros
Per la putraĵ' de neenterigitoj.

Servanto eniras.

Vi servas Oktavion. Ĉu ne vere ?
Serv. En vero, Antonio.
Ant. Cezaro skribis, ke li Romon venu.
Serv. Leteron li ricevis, kaj li venas.
Kaj li min petis al vi buŝe diri—
Ho ve ! Cezaro ! [*Ekvidante la korpon.*
Ant. Doloro de la koro sin sentigas.
Okuloj viaj kun la miaj ploras
Per simpati'. Ĉu via mastro venas ?
Serv. Hodiaŭ nokte li sep mejlojn kuŝos
De Rom'.
Ant. Reiru rapidege, kaj
Rakontu ĉion, kio ĵus okazis.
Jen estas Rom' funebra, Rom' danĝera,
Por Oktavio tute ne senriska ;
For, kaj al li ĝin diru. Tamen, haltu ;
Vi ne reiros antaŭ, ol la korpon
Mi en vendejon portos : tie mi
Parole provos kiel la amaso
Rigardas tiun sangan faritaĵon ;
Laŭ kio vi la staton de aferoj
Prezentos al la juna Oktavio.
Helpu al mi, mi petas.
[*Ili foriras portantaj la korpon de* CEZARO.

SCENO 2.—*La forumo.*

Eniras BRUTO *kaj* KASSIO, *kaj amaso da* URBANOJ.

Urbanoj. Ni volas, ke vi tuj nin kontentigu.
Bru. Do sekvu min kaj aŭdu min, amikoj.
Kassio, al l' alia strato iru.
Kaj apartigu la amason.

Ĉi tie restu mia aŭdontaro ;
Kassia sekvantaro kun li iru ;
Kaj ni rezonojn pri la mort' Cezara
Publike donos.

Unua Urb. Mi volas aŭdi Bruton parolantan.

Dua Urb. Kaj mi Kassion aŭdos, por kompari
Iliajn argumentojn.

[*Foriras* KASSIO, *kun kelkaj* URBANOJ ; BRUTO *supreniras sur la tribunon.*

Tria Urb. Silentu! nobla Bruto supreniras.

Bru. Atentu ĝis la fino.
Romanoj, patrujanoj, kaj amantoj! Aŭdu min pro miaj celoj, kaj silentu, por ke vi aŭdu; kredu al mi pro mia honoro, kaj respektu mian honoron, por ke vi kredu; juĝu pri mi laŭ mia saĝo, kaj ekscitu la sentojn, por ke vi pli bone juĝu. Se estas iu en tiu ĉi kolektiĝo, iu kara amiko de Cezaro, al li mi diras, ke la amo de Bruto al Cezaro egalis al lia. Se do tiu amiko demandos, kial Bruto al Cezaro kontraŭstaris, jen mia respondo:—Ne tial, ke mi malpli amis Cezaron, sed ke mi pli amas Romon. Ĉu vi preferas Cezaron ankoraŭ vivan, kaj ke vi mortu sklavoj, ol ke Cezaro estu malviva, por vivi ĉiuj liberuloj? laŭ la amo de Cezaro al mi mi lin ploras; laŭ lia feliĉo mi ĝojas; laŭ lia braveco mi lin honoras; sed pro lia gloramo mi lin mortigis. Jen larmoj pro lia amo; ĝojo pro lia feliĉo; honoro pro lia braveco; kaj morto pro lia gloramo. Kiu el vi estas tiel malnobla, ke li volas esti neliberulo? se iu, parolu; ĉar lin mi ja ofendis. Kiu el vi estas tiel senhonora, ke li ne amas sian patrujon? Se iu, parolu; ĉar lin mi ja ofendis. Mi paŭzas por respondo.

Ĉiuj. Neniu, ho, neniu, Bruto.

Bru. Neniun do mi ofendis. Mi ne estas farinta pli pri Cezaro, ol faros vi pri Bruto. La rakonto de lia morto restas enskribita sur la arĥivo en la Kapitolio; lia famo ne malestimita laŭ lia indo nek liaj ofendoj trograndigitaj, pro kiuj li mortiĝis.

Eniras Antonio *kaj aliaj, portantaj la korpon de* Cezaro.

Jen venas lia korpo, funebrata de Marko Antonio; kiu, kvankam li ne partoprenis en lia mortigo, ricevos profiton el lia morto, oficon sub la respubliko, tiel same kiel ankaŭ vi ĉiuj. Mi nun foriras, sciante ke, mortiginte mian plej bonan amikon pro la bono de Romo, mi retenas mian propran ponardon por mi mem, kiam miaj sampatrujanoj deziros mian morton.

Ĉiuj. Ho Bruto, vivu, vivu!
Unua Urb. Lin alkonduku hejmen kun triumfo.
Dua Urb. Lin per statu' honoru kun prapatroj.
Tria Urb. Cezar' li estu.
Kvara Urb. La pli bonajn ecojn
De mem Cezaro en li kronu.
Unua Urb. Kun tondraj krioj lin konduku hejmen.
Bru. Sampatrujanoj,—
Dua Urb. Ho, parolas Bruto!
Unua Urb. Silentu!
Bru. Sampatrujanoj, mi foriros sola,
Vi tie ĉi kun Antonio restu:
Honoru la Cezaran korpon, kaj
La paroladon, kiun Antonio
Nun faros per permeso nia, por
La laŭdo de Cezaro. Mi vin petas,
Neniu iru for, ĝis Antonio
Fininta estos sian paroladon. [*Li foriras.*
Unua Urb. Ho, haltu, ni aŭskultu Antonion.
Tria Urb. Li supreniru en publikan seĝon.
Ni aŭdu. Antonio, supreniru.
Ant. Per Bruto, mi ŝuldanto via estas.
[*Supreniras sur la tribumon.*
Kvara Urb. Pri Bruto, kion diras li?
Tria Urb. Li diras, ke per Bruto
Li al ni ĉiuj nun ŝuldanto estas.
Kvara Urb. Li ne kuraĝu Bruton malestimi.
Unua Urb. Cezar' tirano estis.

Tria Urb. Vere estas.
Benita estas Rom' pro lia perdo.
Dua Urb. Silentu! ni aŭskultu Antonion.
Ant. Romanoj vi ĝentilaj—
Urbanoj. Ho! lin aŭdu.
Ant. Amikoj samlanduloj, kaj Romanoj,
Aŭskultu: mi nur venas, ĉe l' funebro
Cezara por ĉeesti, ne lin laŭdi.
Postvivas homojn la malbonaj faroj,
La bonaj ofte kun la korpo mortas.
Pri li do tiel estu! Nobla Bruto
Cezaron pensis esti tro glorama.
Se vere, ĝi makul' terura estis,
Kaj terurege li senmakuliĝis;
Nun, kun permeso de la Brutanaro,
Ĉar Bruto estas honorinda homo—
Kaj ili ĉiuj estas honorindaj,—
Ĉe la funebro lia mi parolos.
Amiko li al mi fidela estis;
Sed Bruto diras, ke li tro gloramis,
Kaj Bruto estas honorinda homo—
Li portis Romon multe da kaptitoj,
Elpago kies la kasegon regnan
Plenigis,—Ĉu gloramon tio montris?
Kun malriĉuloj ankaŭ li kunploris:
Gloramo devus esti pli hardita;
Sed Bruto diras, ke li tro gloramis,
Kaj li tre honorinda homo estas.
Vi vidis ke, je l' festo Luperkala,
Trifoje mi al li proponis kronon,
Trifoje de Cezaro rifuzitan.
Ĉu tio ĉi gloramo al vi ŝajnas?
Sed Bruto diras, ke li tro gloramis,
Kaj Bruto estas honorinda homo.
Ne rebatante kion Bruto diris,
Mi volas nun sciigi ĉion, kion
Mi scias pri Cezaro,—lin vi mem
Antaŭe ne sen kaŭzo ĉiuj amis!

Do kial lian morton ne bedaŭri?
Saĝeco! vi enflugis en la brutojn;
Senprudentiĝis homoj!—Min pardonu,
En tiu ĉerko kuŝas mia koro;
Kaj mi, ke ĝi revenu, devas paŭzi.
Unua Urb. Li ŝajnas laŭ prudento argumenti.
Dua Urb. Se vi pripensas prave pri l' afero,
Cezaron oni traktis tre malbone.
Tria Urb. Mi timas pli malbonan uzurpulon.
Kvara Urb. Ĉu vi la vortojn notis? Li ne volis
Akcepti kronon; li do ne gloramis.
Unua Urb. Se vere, la afero kostos kare
Al kelkaj.
Dua Urb. Vidu kian kompatindan
Vizaĝon li nun portas.
Tria Urb. Pli fidelan
Ol Antonio Rom' neniun havas.
Kvara Urb. Aŭskultu! li denove ekparolas.
Ant. Hieraŭ la ordono de Cezaro
La tutan mondon povis kontraŭstari—
Nun li ĉi tie kuŝas, kaj neniu,
Humila kiel ajn, lin eĉ rigardas!
Ho, mastroj! se mi vere inkliniĝus
Vin igi koleregaj kaj ribelaj,
Mi Bruton kaj Kassion tre mallaŭdus,
Sendube ambaŭ honorindajn homojn.
Mi ilin ne mallaŭdos, mi plivolas
Mallaŭdi la mortinton kaj nin mem,
Ol tiajn honorulojn ekmallaŭdi!—
Jen estas pergamen' kun sigelilo
Cezara, kiun mi en ŝranko trovis!
Ĝi estas de Cezar' la testamento.
Se nur la popolanoj ĝin tralegus—
Pardonu,—mi ĝin legi ne intencas—
Konkurse ili kisus liajn vundojn,
Kaj trempus en la sangon koltukegojn;
Jes, petus memoraĵe unu buklon
De liaj haroj, rememoriĝindan

En ĉiu testamento, kiel riĉan
Por siaj posteuloj heredaĵon.

Kvara Urb. La testamenton legu, Antonio.

Ĉiuj. Jes, jes, la testamenton de Cezaro.

Ant. Amikoj, ne, mi ne ĝin povas legi,
Cezaran amon vi ne devas koni.
Vi ne lignaĵoj, vi ne ŝtonoj, estas,
Sed homoj ; kaj se mi ĝin lasos aŭdi,
Ĝi vin flamigos, ĝi vin frenezigos :
Ĝi ne konvenas, ke vi iam sciu,
Ke de Cezar' vi estas heredantoj,
Ĉar kio do da bono elrezultus ?

Kvara Urb. La testamenton legu de Cezaro ;
Ni volas aŭdi ĝin, ĝin do tralegu.

Ant. Amikoj, haltu ; havu paciencon ;
Mi senintence priparolis ĝion :
Mi timas, ke la honorindajn virojn,
Cezaron kiuj frapis, mi insultos.

Kvara Urb. Ne diru "honorindajn" sed "perfidajn."

Ĉiuj. La testamenton, ho ; la testamenton !

Dua Urb. Ili estas friponoj, mortigintoj ; legu la testamenton.

Ant. Vi min devigos do la testamenton
Tralegi. Ĉirkaŭstaru do la korpon,
Kaj la testamentinton al vi tiel
Mi montros. Ĉu vi volas, ke mi nun
Malsupreniru ?

Ĉiuj. Malsupreniru.

Dua Urb. Deiru. [*Li malsupreniras de la tribuno.*

Tri Urb. Ĉiuj volas.

Kvara Urb. Ĉirkaŭstaru.

Unua Urb. Apartigu vin de la portilo, de la korpo.

Dua Urb. Flanken por Antonio, plej nobla Antonio.

Ant. Ne ĉirkaŭpremu min, mi petas, tiel.

Kelkaj Urb. Ho ! malantaŭen. Flanken ! Pli malproksimen.

Ant. Se iam, estas nun la tempo plori,
Jen, vi rekonos tiun ĉi mantelon.

Mi mem l' okazon rememoras, kiam
Cezar' unuan fojon ĝin surmetis:
Somervespere,—jes,—en sia tendo—
La tagon kiam li Nerviojn venkis!—
Jen! tie ĉi trapasis de Kassio
Ponardo:—kaj, rigardu kian tranĉon
La enviema Kasko tie faris!—
Ĉi tie frapis multamita Bruto;
Kaj kiam li forŝiris la kruelan
Armilon, jen elŝprucis tuj la sango
Cezara, kvazaŭ ĝi ne volas resti
En hejmo, sed certiĝi, ĉu frapinto
La malĝentila povus esti—Bruto!
Ĉar Bruto estis lia favorito
El ĉiuj, kiujn li plej bone amis!—
La plej severa bato tiu estis;—
Kaj kiam li trafantan Bruton vidis,
Maldankemec', pli forta ol armiloj,
Cezaron venkis, tute korŝiritan;
Kaj per mantel' kovrante la vizaĝon,
Eĉ antaŭ la statuo de Pompejo—
De lia brava sango ŝprucigita—
Cezaro granda falis! Kia falo
Okazis tie, miaj samlanduloj!
Kunfalis tiam vi kaj mi kaj ĉiuj,
Dum sanga tiraneco superregis—
Sed nun vi ploras; ŝajnas, ke vi sentas
Kompaton vivan; mallaŭdindaj larmoj
Ne estas ili! Ĉu vi verŝas larmojn,
Vidante nur vestaĵon disŝiritan?
Rigardu do ĉi tien, kie kuŝas
Li mem, de perfiduloj difektita.

Unua Urb. Ho kompatinda vidaĵo
Dua Urb. Ho nobla Cezaro!
Tria Urb. Ho malĝojiga tago!
Kvara Urb. Ho perfiduloj, friponoj!
Unua Urb. Ho plej sanga vidaĵo!
Dua Urb. Ni venĝos nin.

Ĉiuj. Venĝon! For! Serĉu! Bruligu! Fajron! Mortigu!
Ne lasu vivi unu solan perfidulon!
Ant. Haltu, sampatrujanoj!
Unua Urb. Silentu! aŭdu noblan Antonion.
Dua Urb. Ni aŭdu lin, ni sekvu lin, ni mortu kun li.
Ant. Amikoj karaj, sindetenaj estu;
Vin gardu de tro maltimegaj agoj,
Ĉar la kulpuloj estas honorindaj:—
Kiaj privataj zorgoj ilin pikis,
Al mi ne klare estas,—kiel saĝaj
Kaj honorindaj homoj, ili nepre
Respondos per rezonoj pri la faro.
Mi volas ne forŝteli viajn korojn,
Nek povas mi paroli kiel Bruto,
Sed,—vi min konas—kiel militisto
Amanta kunsoldaton, kaj konato
De ili, kiuj la permeson donis:
Ĉar al mi mankas sprito kaj paroloj,
Kaj gesto, kaj necesaj naturdonoj,
Entuziasmigontaj aŭdantaron;
Senruza estas mia parolado;
Nenion novan mi al vi malkovras,
Al vi montrante vundojn de Cezaro,
Por ke ĉi tiuj buŝoj senparolaj
Je mia flanko ankaŭ forte plendu.
Sed se mi estus Brŭto, Bruto mi,
Jen ia Antonio, kiu povus
Inciti la plej malsovaĝan koron,
Kaj elkriigi vundojn de Cezaro
En tia maniero, kia igus
La ŝtonojn mem de Romo ekribeli.
Ĉiuj. Ni ekribelu.
Unua Urb. La domon ni de Bruto ekbruligu.
Tria Urb. For venu do, la konspirantojn serĉu.
Ant. Min tamen aŭdu, miaj samlandanoj.
Ĉiuj. Silentu! aŭdu noblan Antonion.

Ant. Vi iras fari vi ne scias kion.
Per kio do meritis vian amon
Cezaro ? Vi ne scias : mi konstatos :
Nu, lian testamenton vi forgesas.
Ĉiuj. Silenton : aŭdu ni la testamenton.
Ant. Jen estas, de Cezaro sigelita,
La testamento. Al urbano ĉiu
De Romo sepdek kvin li drakmojn donis.
Dua Urb. Cezaro nobla ! venĝu lian morton.
Tria Urb. Cezaro reĝa !
Ant. Pacience aŭdu.
Ĉiuj. Silentu !
Ant. Li testamentis ĉiujn promenejojn,
Privatajn laŭbojn, ĉiujn pomarbejojn
Apudtiberajn ; li al vi kaj viaj
Donacis je eterne, plezurigajn,
Sanigajn lokojn, por vin refreŝigi.
Cezaron tian kiam vi revidos ?
Unua Urb. Neniam. Venu for, for venu, ni
Bruligu lian korpon ĉe l' sanktejo,
Kaj per brulaĵoj ekflamigu domojn
De l' perfiduloj. Portu nun la korpon,
Dua Urb. Iru, portigu fajron.
Tria Urb. Deŝiru benkojn.
Kvara Urb. Deŝiru lignajn seĝojn, benkojn,
Ne grave kion. [*La* URBANOJ *foriras kun la korpo.*
Ant. Malbono nun laŭvole ekfunkciu !

Eniras Servanto.

Kion vi volas, knabo ?
Serv. Jam venis Oktavio, via Moŝto.
Ant. Kie li estas ?
Serv. Li kaj Lepido ĉe l' Cezara domo.
Ant. Kaj tien mi tuj iros lin viziti :
Li venas invitite ; nun Fortuno,
Humoro en petola, kion ajn
Donacos.

Serv. Mi aŭdis lin dirantan, ke Kassio
Kaj Bruto kvazaŭ frenezuloj rajdis
Tra la pordegoj Romaj.
Ant. Kompreneble
La popolanoj jam ekdonis signojn
De mia ekscitig'. Al Oktavio ! [*Ili foriras.*

SCENO 3.—*Strato.*

Venas CINNO *la poeto.*

Cin. En sonĝo mi festenis kun Cezaro,
Kaj mia imagado subpremiĝis
Sub ŝarĝo de aferoj malĝojigaj :
Mi kontraŭvole vagas el la domo,
De io kondukate.

Venas URBANOJ.

Unua Urb. Kiun nomon vi havas ?

Dua Urb. Kien vi iras ?

Tria Urb. Kie vi loĝas ?

Kvara Urb. Ĉu vi estas edzo aŭ fraŭlo ?

Dua Urb. Respondu senpere al ĉiu.

Unua Urb. Jes, kaj mallonge.

Kvara Urb. Jes, kaj saĝe.

Tria Urb. Jes, kaj vere ; estos plej bone al vi.

Cin. Kiun nomon mi havas ? kien mi iras ? kie mi loĝas ? Ĉu mi estas edzo aŭ fraŭlo ? Tiam, por respondi al ĉiu rekte kaj mallonge, saĝe kaj vere : saĝe, mi diras, ke mi estas fraŭlo.

Dua Urb. Tio estas tiel same kiel diri, ke la edzoj estas malsaĝuloj : vi ricevos de mi baton pro tio, mi kredas. Daŭrigu, senpere.

Cin. Rekte, mi iras al la funebro de Cezaro.

Unua Urb. Ĉu kiel amiko aŭ malamiko ?

Cin. Kiel amiko.

Dua Urb. Al tio vi respondis senpere.

Kvara Urb. Pri via loĝejo, mallonge.

Cin. Mallonge, mi loĝas apud la Kapitolio.

Tria Urb. Kiun nomon, sinjoro, vere ?

Cin. Vere mi havas la nomon Cinno.

Unua Urb. Disŝiru lin ; li estas konspiranto.

Cin. Mi estas Cinno la poeto, mi estas Cinno la poeto.

Kvara Urb. Ŝiru lin pro liaj nebonaj versoj, ŝiru lin pro liaj nebonaj versoj.

Cin. Mi ne estas Cinno la konspiranto.

Kvara Urb. Tute egale, li havas la nomon Cinno : Elŝiru nur lian nomon el lia koro, kaj ellasu lin.

Tria Urb. Ŝiru lin, ŝiru lin ! Venu, brulaĵoj ! fajriloj ; al la dom' de Bruto, de Kassio, bruligu ĉion ; unuj al la dom' de Decio, aliaj al tiu de Kasko ; aliaj al tiu de Ligario : iru, for !

[*Ĉiuj foriras.*

AKTO IV.

SCENO 1.—*Domo en Romo.*

ANTONIO, OKTAVIO, *kaj* LEPIDO, *sidantaj ĉirkaŭ tablo.*

Ant. Do tiom devos morti, kies nomojn
Ni jam trastrekis.
Okt. Via frato ankaŭ,
Lepido, devos morti ; ĉu vi tion
Konsentas ?
Lep. Mi konsentas—
Okt. Antonio,
Trastreku lian nomon—
Lep. Sed kondiĉe
Ke, Antonio, de fratino via
La fil' Publio plu ne vivu.
Ant. Li
Ne vivu ; vidu, mi kondamnas lin.
Sed iru al Cezara dom', Lepido ;
La testamenton portu, ni decidos
Kiel plimalgrandigi heredaĵojn.
Lep. Ĉu mi ĉi tie trovos vin ?
Okt. Ĉi tie, aŭ ĉe la Kapitolio. [LEPIDO *foriras.*
Ant. Vireto estas tiu, sen merito,
Krom tiu de kvazaŭa kuriero.
Ĉu ĝi konvenas, ke li en terglobo
Trione dividita partoprenos
Konkure kun ni, kiel egalulo ?
Okt. Vi mem lin kredis tia, kaj aprobis
Voĉdonon lian pri la kondamnitoj,
Laŭ la enskribo en nomaro nia.
Ant. Mi havas, Oktavio, pli da jaroj
Ol vi, kaj kvankam mi honorojn tiajn

Sur lin surmetas, kiel egalpezon
Al ŝarĝoj de l' skandalo, kiu eble
Bonfamon nian povus malpurigi.
Li tamen, kiel la azeno oron,
En ŝvito kaj en ĝemoj ilin portos,
Laŭ nia vol' per vip' aŭ kondukilo ;
Kaj, alportinte la trezoron, kien
Vi volas, lin malŝarĝu kaj forlasu,
Simile je l' azeno, por balanci
L' orelojn, kaj sin paŝti sur herbejo.
Okt. Nu, faru tion, kio al vi plaĉos ;
Sed militisto sperta kaj bravega
Li estas.
Ant. Kaj ĉevalo mia ankaŭ ;
Pro kio mi al li asignas multan
Furaĝon, kaj instruas kelkajn artojn :
Batali, vigle turni sin, kuradi
Antaŭen, halti, ĉar animo mia
Movadas lian korpon ; kaj Lepido
Al mi similan rolon ludas ; estas
Necese lin instrui, dresi, movi—
Lin senspritulon—kiu ĉiam flugas
Malalte, konfuzante la ŝajnigon
Je l' vero, alprenante kiel novajn
La modojn forĵetitajn de aliaj :
Rigardu lin do kiel nuran ilon.
Sed, Oktavio, aŭdu pri gravaĵoj :
Nun amasigas Bruto kaj Kassio
Armeon : mi antaŭeniri devas ;
Kunvenu tial niaj aliĝantoj,
Rimedoj niaj plene etendiĝu,
Kaj ni konsilu unu la alian,
Por antaŭzorgo pro intrig' sekreta,
Kaj kontraŭbatalado de atakoj.
Okt. Ni faru tion, ĉar ni, fostligite,
De malamikoj lacigataj estas ;
Kaj kelkaj jam sub ridetanta masko
Sennombrajn malicaĵojn konspiradas. [*Ambaŭ foriras*.

SCENO 2.—*Tendaro apud Sardiso.*

Antaŭ la tendo de BRUTO.

Tamburado. Eniras BRUTO, LUCILIO, LUCIO, *kaj soldatoj,* TITINIO *kaj* PINDARO *renkontas ilin.*

Bru. Ho, haltu !
Lucil. La signaldiron donu, ho ! kaj haltu.
Bru. Kie Kassio estas, Lucilio ?
Lucil. Li apudestas ; kaj Pindaro venas,
Por fari la salutojn de Kassio.
Bru. Li bone min salutas ; via mastro,
Pindaro, per si mem aŭ per subuloj
Min eble senintence enuigis ;
Sed se li nun alvenas, estos bone.
Pin. Sendube mia mastro tia, kia
Li vere estas, ŝajnos, tute plena
Je respektego kaj honor'.
Bru. Sendube :
Sciigu, Lucilio, al mi kiel
Li vin akceptis : min pri ĝi certigu.
Lucil. Afable kaj sufiĉe respektplene,
Sed ne kun pruvoj de la intimeco,
Nek per l' amika interparolado
De antaŭ kelkaj jaroj.
Bru. Vi priskribis
Amikon varman jam malvarmiĝantan :
Ĉar kiam ajn komencas l' amo velki,
Ceremoniojn eksterordinarajn
Ĝi uzas. Inter karaj intimuloj
Ŝajnigo ne sin trovas ; sed simile
Al koleremaj sub la man' ĉevaloj,
Malsinceruloj sian fierecon
Vidigas ; tamen kiam ili devus
Elporti la pikantan spronon ili
La kapojn klinas, kaj, malkuraĝuloj,
Defalas en la provo. Ĉu soldatoj
Liaj alproksimiĝas ?

Lucil. En Sardiso
Hodiaŭ nokte eble ili loĝos;
Sed la plimulto,—la ĉevalistaro,—
Kassion akompanas.
[*Mallaŭta marŝmuziko post la sceno.*
Bru. Ha! aŭskultu!
Li jam alvenis. Marŝu lin renkonti
Antaŭen ne rapide.

Venas KASSIO *kaj liaj soldatoj.*

Kas. Ho, haltu!
Bru. Ho, haltu! donu ĉiuj la parolon.
Unua Sold. Haltu!
Dua Sold. Haltu!
Tria Sold. Haltu!
Kas. Plej nobla frat', vi traktis min maljuste.
Bru. Vi dioj, juĝu! Ĉu mi malamikojn
Maljuste traktas? Kaj se ne, des malpli
Mi kontraŭ frato povas tiel agi.
Kas. Sindetenado via, Bruto, kaŝas
Malicon; kaj farante maljustaĵojn—
Bru. Kassio, trankviliĝu; viajn plendojn
Mallaŭte diru; mi vin bone konas.
Ni antaŭ la okuloj de l' armeoj,
La rigardintoj nur de nia amo,
Ne nin riproĉu reciproke: faru
Ke ili sin formovu; kaj malvolvu
En mia tendo viajn plendojn, kie
Aŭskultos mi atente.
Kas. Ho Pindaro,
Anarojn siajn niaj kapitanoj
De ĉi tiea kampo forkonduku.
Bru. Kaj tiel same agu, Lucilio;
Neniu al la tendo venu, ĝis
Kunsidon nian ni finintaj estos.
Ĉe l' enirejo Titinio kaj
Lucio staru garde. [*Ili foriras.*

SCENO 3.—*Interne de la tendo de* BRUTO.

Venas BRUTO *kaj* KASSIO.

Kas. Vi nepre kontraŭ mi maljuste agis,
Lucion Pellon mallaŭdinte, tial,
Ĉar li akceptis de la Sardisanoj
Donacojn, dum leterojn miajn, varme
Pro li petantajn,—ĉar mi jam sciiĝis
Pri lia indo—oni malestimis.
Bru. Sed certe tia pet' vin malhonoris.
Kas. Je tia tempo ne konvene estas
Pri ĉia kulpo fari kontraŭjuĝon.
Bru. Permesu al mi diri, ke vin mem,
Kassio, oni nomas avarulo,
Pro oro makleranta la oficojn
Je sentaŭguloj.
Kas. Min avaremulo?
Vi scias, ke vi, Bruto, tion diras,
Alie vi ne dirus plu parolon.
Bru. Jes, via nom' honoras la malbonon,
Kaj la punado kaŝas sian kapon.
Kas. Punado!
Bru. Memoru Marton, jes, l' Idusojn martajn;
Ĉu ne Julio pro justec' pereis?
Kaj ĉu ne ĉiuj ni frapantoj frapis
Pro mem justeco? Kiu do el ni,
La estron de la mondo mortiginte,
Konsiderante lin nur ĉefrabisto,
Makulos nun la manojn per moneroj,
Kaj vendos nian vastan honorfonton
Pro ia ŝtofo tiel manprenebla?
Plivolus mi lunbojadanta hundo,
Kassio, esti ol Romano tia.
Kas. Ne min bojadu, Bruto, mi ne volas
Toleri ĝin: malprave vi nun provas
Min kontraŭstari; mi soldato estas,

Maljuna, sperta, pli ol vi kapabla
Kondiĉojn fari.
Bru. Ne, mi neas tion.
Kas. Mi jese diras.
Bru. Mi rekontraŭdiras.
Kas. Ne min incitu plu, mi min forgesos;
Atentu pri la sano, ne min tentu.
Bru. For, foren!
Kas. Ne, ĉu eble?
Bru. Min aŭskultu.
Ĉu mi koleron vian preterlasos,
Kaj tremos je l' vizaĝ' de frenezulo?
Kas. Ho, dioj! Ĉu mi devos ĝin toleri?
Bru. Kaj pli; rompiĝu la fiera koro;
La sklavojn viajn kaj neliberulojn
Per via koleremo eltremigu.
Sed, ĉu mi devas paŭzi, kaj aŭskulti?
Ĉu min retiri de kolero via,
Fortreni min de via ĉagrenego?
Ne, ne, venenon ĝian vi digestu,
Se eĉ vi diskreviĝos, ĉar de nun
Mi faros el vi veran ridindaĵon,
Se vi vespul' fariĝos—
Kas. Ho, vi dioj!
Bru. Vi nomas vin pli bona militisto;
Ĝin pruvu, ne nur per fanfaronado,
Kaj mi aprobos ĝin; ĉar miaflanke
Mi plezurege lernas per bravuloj.
Kas. Ankoraŭ, Bruto, vi maljuste agas;
Mi diris pli maljuna, ne pli bona;
Ĉu vere?
Bru. Kion ajn, ne grave estas.
Kas. Cezaro ne kuraĝus tion diri.
Bru. Silentu, vi ne lin kuraĝus provi.
Kas. Kuraĝus?
Bru. Ne.
Kas. Ne lin kuraĝus provi?
Bru. Pro via vivo, ne.

Kas. Pri mia amo
Ne tro kalkulu, Bruto ; eble faros
Mi tion, kion poste mi bedaŭros.
Bru. Vi faris jam aferon bedaŭrindan.
Ne min timigas la minacoj viaj,
Ĉar mi armaĵe portas honestecon,
Kaj ili preterflugas kiel vento,
Ne min tuŝante. Sed mi vin petegis
Pri ora sumo, kiun vi rifuzis,—
Mi ne venigas monon malhoneste :
Monigi mian koron mi preferus,
Kaj eĉ drakmigi mian sangon, ol
Elŝiri el la kamparanaj manoj
La fruktojn de laciga taglaboro
Maljuste : nu, mi per sendito petis
Militopagon por legioj miaj :
Vi ĝin rifuzis : Ĉu Kassio tion ?
Ĉu al Kassio povus mi tiele
Respondi ? Se Mark' Bruto avarema
Fariĝos tiel, ke friponan monon
Li per serur' forkaŝos kontraŭ frato,
Pretigu, dioj, vian tondran sagon ;
Lin dissaltigu.
Kas. Mi mem ne rifuzis.
Bru. Jes, vere.
Kas. Ne, li estis malsaĝulo,
La resendito mia. Mia Bruto
Disŝiris mian koron ; vera frato
Kunporti devus fratajn malfortaĵojn,
Sed Bruto miajn multe trograndigas.
Bru. Nur kiam mi ilian pezon sentas.
Kas. Vi min malamas.
Bru. Ne, nur viajn kulpojn.
Kas. Okul' amika ilin ne rigardus.
Bru. 'Flatula,' diru, kvankam ili ŝajnus
Grandegaj kiel la arkaĵ' ĉiela.
Kas. Vi, Oktavio, Antonio, venu,
Vin venĝu al Kassio malfeliĉa,
Ĉar al Kassio tedas nun la mondo ;

Amikoj kaj eĉ fratoj lin malamas ;
Sen liberec' ; la plej malgrandajn kulpojn
Sur notlibreto oni relegadas,
Por lin riproĉi. Ho, ho, ve ! mi volus
Elverŝi larman maron !—Jen ponardo,
Jen mia nuda brust' ; interne, koro
Pli kara ol la oro mem de Pluto ;
Se vi Romano estas, ĝin elprenu ;
Mi, oron rifuzinte, donos koron ;
Ekfrapu, kiel vi Cezaron frapis ;
Ĉar, malamante, vi lin plie amis,
Ol nun Kassion.
Bru. La ponardon metu
En ingon ; se vi iam ekkoleros,
Amplekson plenan la kolero trovos
Mi ne insulton ĉerpos el humoro ;
Kassio, kun ŝafido vi kuniĝas,
Ekkolerema, kiel la siliko
Ekbruliĝema, kiu incitite
Fajreron montras, tiam malvarmiĝas.
Kas. Ĉu do Kassio iĝos ridindaĵo
Por sia Bruto, kiam kordoloro
Kaj ĉagrenego lin tro forte premas ?
Bru. Dirante tion, ankaŭ mi koleris.
Kas. Konfese, Bruto ! Donu do la manon.
Bru. La koron ankaŭ.
Kas. Bruto !
Bru. Jes, daŭrigu.
Kas. Ĉu vi al mi sufiĉan amon nutras,
Ke, kiam la humor' patrinnaskita
Min igos forgesema, vi elportos ?
Bru. Kassio, al mi fidu ; estontece
Se min Kassio malĝentile traktos,
Mi ŝajnu la patrinon lian aŭdi,
Kaj pace lin forlasu.
Poet. (*Post la sceno*). Min preterlasu al la generaloj ;
Ĉar ian ofendaĵon inter ili
Mi timas. Ni ne lasu ilin solaj.

Lucil. (*Post la sceno*). Vi devas ne eniri.
Poet. (*Post la sceno*). Nenio krom la morto min retenos.

Eniras POETO *sekvata de* LUCILIO, TITINIO, *kaj* LUCIO.

Kas. Ho, kio estas ?
Poet. Hontu, generaloj,
Kion vi volas fari ? Premu manojn
De amikeco, kiun ja vi ŝuldas
La unu al l' alia, ĉar ol vi
Mi certe malpli juna estas.
Kas. Vere
Ĉi tiu filozofo min insultas !
Bru. For, vi malĝentilulo ; vigle for !
Kas. Afable, Bruto, portu liajn kulpojn.
Bru. Jes, kiam li teniĝon saĝan lernos ;
Milito nepre tiajn malsaĝulojn
Forsendos kun iliaj rimversaĵoj.
Amiko, for !
Kas. Foriru senprokraste. [*La* POETO *foriras.*
Bru. Ordonu, Lucili' kaj Titinio,
Loĝejon noktan por la soldataroj.
Kas. Revenu, kaj kun vi al ni venigu
Messalon tuj. [LUCILIO *kaj* TITINIO *foriras.*
Bru. Lucio, ho, pokalon
Da vino. [LUCIO *foriras.*
Kas. Mi ne pensis ke vi tiel
Ekkolerema estas.
Bru. Ho Kassio,
Min multaj kordoloroj ekturmentas.
Kas. Filozofi' al vi ne estas helpa,
Se malĝojigas vin la ĉiutagaj
Okazoj.
Bru. Ne, neniu povas porti
Pli bone kordoloron. Jam Portino
Mortinta estas !
Kas. Ha ! Portino ! Ŝi—
Bru. Mortinta estas.

Kas. Kiel min vi ne
Mortigis, kiam mi vin kolerigis ?
Nesuferebla, korŝiranta perdo !
Sed kio kaŭzis—
Bru. Mia forestado,
Kaj bedaŭrego, ĉar sin Oktavio
Kaj Antonio fortikigis tiel,
(Mortante ŝi pri tio ĉi sciiĝis) ;
Ŝi freneziĝis, kaj dum la foresto
De l' servistinoj ŝi englutis fajron.
Kas. Kaj mortis—
Bru. Tiel.
Kas. Ho senmortaj dioj !

Reeniras LUCIO *kun vino kaj torĉeto.*

Bru. Pri ŝi ne plu parolu. Jen pokalo,
En kiu ĉiujn malafablajn vortojn
Mi nun dronigas. [*Li trinkas.*
Kas. Mia koro, Bruto,
Soifas je toasto tiel nobla.
Plenigu ĝis la vino superfluos,
Lucio, la randaĵon ; mi ne povos
Tro multe trinki l' amon mem de Bruto. [*Li trinkas.*
Bru. Eniru, Titinio ! [LUCIO *foriras.*
Vi, Messalo,
Veninta bone estu ; nun, amikoj,
Ĉirkaŭsidante tiun ĉi kandelon,
Ni ekzamenu kio al ni mankas
Por nia militiro.
Kas. Ho Portino !
Bru. Ne, ne, mi vin petegas ; jen, Messalo,
Ricevis mi sciigojn per leteroj,
Ke Oktavio kaj Mark' Antonio,
Kun granda soldataro alvenante,
Minacas al Filippo.
Mes. Mi ricevis
Leterojn laŭ la sama mem signifo.

Bru. Ĉu io aldonita ?
Mes. Certe, ke
Per sia mallaŭleĝa proskripcio,
Kaj per ekzildekretoj, Oktavio,
Lepid' kaj Antonio cent mortigis
El senatana rango.
Bru. La leteroj
En tio ne konformaj estas: miaj
Nur nomas sepdek senatanojn, kiuj
Mortiĝis laŭ ilia enskribado;
Kun ili Cicerono.
Kas. Cicerono !
Mes. Mortinta estas laŭ la proskripcio.
Ĉu vi ricevis de edzino via
Leterojn ?
Bru. Ne, Messalo.
Mes. Pri ŝi nenion per leteroj viaj ?
Bru. Nenion.
Mes. Tio al mi ŝajnas stranga.
Bru. Sed kial vi demandas ? Ĉu per viaj
Vi ion pri ŝi scias ?
Mes. Ne, sinjoro.
Bru. La veron diru pro honoro via.
Mes. La veron aŭdu do kiel Romano.
Ŝi certe mortis per rimedoj strangaj.
Bru. Adiaŭ, ho Portino. Ni, Messalo,
Formorti devas: meditante tion
Mi povas ŝian perdon nun elporti.
Mes. Grandanimuloj tiel devus porti
La batojn de la sorto.
Kas. Jes, Messalo,
Mi tian idealon altestimas
Kun vi egale, sed naturo mia
Ĝin tiamaniere ne elportus.
Bru. Nu, al l' afero. Ĉu vi pensas ke
Plej bone estus, se mi al Filippo
Ekmarŝus ?
Kas. Mi ne kredas tion bona.

Bru. Pro kio?
Kas. Ĉar pli bone estos, ke
La malamiko serĉu nin: li tiel
Malŝparos la rimedojn, la soldatojn
Lacigos, malhelpante sin: dum ni
Batali povos per senlaca forto.
Bru. Rezonoj bonaj al pli bonaj cedu.
La interloĝantaro de Filippo
Ĝis tie ĉi amikoj niaj estas
Nur pro devigo; ĉar monoferadon
Al ni tre kontraŭvole ili donis:
La malamik', marŝante tra ilia
Landlimo, sian nombron pliigados,
Antaŭeniros kun kuraĝo freŝa;
Sed ni je tiu helpo lin senigos,
Se ni renkontos lin apud Filippo,
Post ni tenante tiujn ĉi.
Kas. Sed, Bruto—
Bru. Pardonu: kaj memoru plie, ke
Aliĝantaron nian ni elprovis,
Legioj niaj plene jam varbiĝis,
Esperoj niaj tuŝas la zeniton;
La malamik' kreskadas ĉiun tagon!
Ni paŝ' post paŝo ekplimalfortiĝos.
Marfluo estas en aferoj homaj,
Ĝin profitante, venkos ni Fortunon;
Alie, nia tuta vivvojaĝo
Finiĝos per mizera ŝippereo.
Sur alta maro nia ŝip' surnaĝas,
Kaj ni la fluon devas kapti, aŭ
L' okazon perdi.
Kas. Marŝu do antaŭen;
Ni ĉiuj nin renkontos ĉe Filippo.
Bru. Profunda nokt' deiris de l' ĉielo
Dum nia parolado, kaj ni devas
Obei la bezonojn de naturo,
Ŝpareme iom da ripoz' ĝuante.
Ĉu vi deziras pli?

Kas. Ne, bonan nokton :
Ni morgaŭ frumatene ekforiros.
Bru. Lucio (*Eniras* LUCIO) mian robon. (*Eliras* LUCIO) Ho Messalo,
Adiaŭ : al Kassio bonan nokton,
Kaj dormu bone ; bonan nokton ankaŭ,
Ho Titinio.
Kas. Mia kara frato,
La nokto tre malbone komenciĝis ;
Neniam tia malkonsent' dividu
Spiritojn niajn, Bruto.
Bru. Estas bone.
Kas. Sinjoro, bonan nokton.
Bru. Bonan nokton.
Tit. Mes. Sinjoro, bonon nokton.
Bru. Al vi ĉiuj
Adiaŭ. [*Ĉiuj foriras krom* BRUTO.

Reeniras LUCIO *kun la robo.*

Al mi la robon. Kie estas via
Kordinstrumento, he ?
Luc. Jen, via moŝto.
Bru. Dormeme vi parolas, bona knabo ;
Mi ne mallaŭdas vin ; vi tro maldormis.
Klaŭdion kaj alian iun voku,
Por kuŝi tie ĉi en mia tendo.
Luc. Varrono, kaj Klaŭdio !
[*Eniras* VARRONO *kaj* KLAŬDIO.
Var. Kiu vokas ?
Bru. Bonvolu tie ĉi kuŝigi vin.
Mi eble post ne longe vin revekos,
Por ke vi vidu pri aferoj miaj
Kassion.
Var. Sur piedoj ni plezure
Maldormos.
Bru. Ne, sinjoroj bonaj, ne ;
Kuŝiĝu ; eble mi ne vin bezonos.

Lucio, jen la dezirita libro;
Mi metis ĝin en poŝon de la robo.
[VARRONO *kaj* KLAŬDIO *kuŝiĝas*.
Luc. Mi pensis, ke ĝin via moŝto havas.
Bru. Forgesu, bona knab', senzorgon mian.
Ĉu vi subteni povas la palpebrojn,
Kaj veki ian dolĉan melodion?
Luc. Volonte, via moŝto.
Bru. Knabo mia,
Mi tro profitas vian afablecon.
Luc. Se via moŝto volas—
Bru. Mian volon
Mi ne rigardu antaŭ via forto;
Junuloj multe da ripoz' bezonas.
Luc. Sed jam mi dormis, via moŝto.
Bru. Tre bone, kaj mi lasos al vi dormi.
Ne longan tempon mi detenos vin,
Kaj, se mi vivos, mi vin rekompencos.
[*Muziko kaj kanto.*
La melodi' dormigas. Ho, vi dormo,
Sur mian knabon multepezan manon
Vi metas. Knabo saĝa, bonan nokton;
Mi ne kruele vekos vin, kaj, se
Vi falos, vi la muzikilon rompos;
Mi prenas ĝin; knab' saĝa, bonan nokton
Mi pensu; ĉu mi ne la paĝon faldis,
Kiam mi ĉesis legi? Jen, mi kredas.

Aperas la Spirito de CEZARO.

Ne bone brilas tiu ĉi kandelo!
Ha! kiu venas? Mi ektimas ke
La malforteco de okuloj miaj
Ĉi tiun monstran fantazion kreas.
Ĝi min almarŝas. Ĉu vi estas io?
Ĉu dio, aŭ anĝelo, aŭ diablo,
La sangon mian kiu rigidigas,
Starigas miajn harojn? Diru, kio
Vi estas.

Spirito. Spirito malboniga al vi, Bruto.
Bru. Kial vi venas ?
Spirito. Por sciigi vin,
Ke vi min vidos en Filippo.
Bru. Bone ;
Mi vin revidos.
Spirito. Vere, en Filippo.
Bru. Nu, mi do vin revidos en Filippo.
[*La* SPIRITO *malaperas.*
De mi pli da kuraĝo akirinta
Vi neniiĝis : mi, spirit' malbona,
Pli longe kun vi volus paroladi.
Lucio, kaj Varrono ! ho, vekiĝu,
Klaŭdi' !
Luc. Malagordiĝas miaj kordoj.
Bru. Li pensas, ke ankoraŭ li ludadas.
Vekiĝu, ho Lucio !
Luc. Jes, via moŝto.
Bru. Ĉu vi en sonĝo faris tian krion ?
Luc. Ĉu mi ekkriis vere, via moŝto ?
Bru. Vi vere kriis ; ĉu vi vidis ion ?
Luc. Nenion, via moŝto.
Bru. Redormu nun, Lucio ; Ho ! Klaŭdio,
(*Al* VARRONO) Vekiĝu, tie !
Var. Jes, via moŝto !
Klaŭ. Jes, via moŝto !
Bru. Dormante kial vi ekkriis tiel ?
Var. Klaŭ. Ĉu vere, via moŝto ?
Bru. Ĉu vi ion
Rimarkis ?
Var. Mi nenion vidis.
Klaŭ. Nek
Mi ankaŭ, via moŝto.
Bru. For, salutu
Por mi Kassion, mian bonan fraton ;
Lin petu ekmarŝigi liajn vicojn,
Kaj ni lin sekvos.
Var. Klaŭ. Certe, via moŝto. [*Ĉiuj foriras.*

AKTO V.

SCENO 1.—*La ebenaĵoj de Filippo.*

Venas OKTAVIO, ANTONIO, *kaj ilia militistaro.*

Okt. Esperoj niaj, vidu, Antonio,
Neatenditan rezultaton havas.
Vi diris, ke de sia altaĵaro
La kontraŭuloj ne malsupreniros
Sur l' ebenaĵon, sed la mal' okazis.
Kaj ili sin pretigas por batali,
Apud Filippo forte minacantaj.
Ilia soldataro sen alvoko
Invitas nin al frua ekatako.

Ant. Iliajn pensojn mi diveni povas :
Plivolus ili iri aliloken,
Sed timplenec' miksita kun braveco
Incitas ilin, kune kun l' espero
Ke ni l' impreson de kuraĝ' ilia
Ricevos per ĉi tiu ŝajno ; tamen
Ne estas tiel.

Eniras SENDITO.

Send. Vigle, generaloj,
Nun vin preparu, ĉar la malamiko
Antaŭeniras kun parad' milita,
Insigno lia sangkolora flirtas
En la aero : al batal' rapidu !

Ant. Konduku, Oktavio, viajn arojn
Je l' flank' maldekstra de la ebenaĵo.

Okt. Ne, je la dekstra : tenu vi l' maldekstran.

Ant. Petegon mian kial vi rifuzis ?

Okt. Mi ne rifuzis ; sed mi volus tiel. [*Marŝmuziko.*

Tamburado. Venas Bruto, Kassio, *kaj ilia militistaro ;* Lucilio, Titinio, Messalo, *kaj aliaj.*

Bru. Jen ili haltas, kaj parolon petas.
Kas. Halt', Titinio ; ni diskuti volas.
Okt. Ĉu ni la signon, Antonio, montros.
Ant. De ekbatalo ? Ne, iliajn batojn
Rebatu ni. Antaŭen ; diskutadon
La generaloj volas tuj komenci.
Ho ! haltu do, ĝis la signal' aperos.
Bru. Paroloj antaŭ batoj : ĉu ne vere ?
Okt. Ni ne parolojn amas, kiel vi.
Bru. Paroloj bonaj ol malbonaj frapoj
Pli bonaj estas, Oktavio.
Ant. Kun
Malbonaj frapoj, Bruto, bonajn vortojn
Vi donas : vidu la ŝiraĵon, kiun
Vi faris en la koro de Cezaro,
Samtempe kiam laŭte vi ekkriis
" Saluton, longan vivon al Cezaro ! "
Kas. Ankoraŭ ni ne scias, Antonio,
Al kie viajn batojn vi direktos.
Sed viaj vortoj rabas la abelojn
De Hiblo,—sen mielo lasas ilin.
Ant. Ne sen pikiloj.
Bru. Jes, kaj sen sonado ;
Ĉar vi ilian ŝtelis for zumadon,
Kaj, antaŭ ol vi pikas, vi minacas.
Ant. Friponoj, vi ne tiel agis, kiam
Malbenaj iloj viaj reciproke
Sin hakis en la flankoj de Cezaro :
Vi ridis, kiel ridas la simioj,
Montrante viajn dentojn, kaj l' piedojn
Vi lekis de Cezaro kiel hundoj,
Dum la malnobla Kasko malantaŭe,
Agante kun serpenta perfideco,
Lin frapis sur la kolon. Ho flatuloj !
Kas. Flatuloj ! Bruto, vin ni devas danki :
Ĉi tiu lango nin nun ne insultus,

Se nur vi la konsilon de Kassio
Sekvinta estus.
Okt. Nun al l' afero : se la rezonado
Eltiras ŝviton el muskoloj niaj,
Ŝviterojn en sangerojn baldaŭ ŝanĝos
La mem pruvado : vidu :
Mi tiras glavon kontraŭ konspirantoj
Sed kiam mi ĝin poste eningigos ?
Neniam, ĝis mi venĝos de Cezaro
La tri kaj tridek vundojn, aŭ ĝis novan
Cezaron frapos la perfidaj glavoj.
Bru. Vi ne per perfiduloj povas morti,
Se vi ne portas ilin kun vi.
Okt. Tion
Mi pensas ; ĉar la sort' ne antaŭvolis
Ke mi per glav' de Bruto devus fali.
Bru. Per tia mano eĉ la plej famega
Pli honorindan morton ne atingus.
Kas. Li, obstinulo, certe ne meritas
Honoron tian—li la kamarado
De Antonio,—taŭga nur restadi
Regalemulo kaj festenamanto !
Ant. Kassio, vi la koleremon portas
De antaŭ jaroj !
Okt. Venu, Antonio !
Jen, perfiduloj, nia lasta vorto :
Al morta vetbatal' ni vin alvokas ;
Se vi kuraĝas, venu al la kampo
Hodiaŭ, se ne, kiam vi malsatos
Por batalad'.
[*Foriras* OKTAVIO, ANTONIO, *kaj ilia militistaro.*
Kas. Nun blovu la ventegoj ;
L' urago el ĉielo ekbruegu,
La barko velu sur muĝantaj ondoj,
Estante en danĝer' de fulmotondro.
Bru. Ho ! unu vorton, Lucili'.
Lucilio. (*Elpaŝante antaŭen*). Sinjoro !
[BRUTO *kaj* LUCILIO *interparolas aparte.*

Kas. Messal' !
Mes. (*Elpaŝante antaŭen*). Al viaj servoj, generalo.
Kas. Ĉi tiun tagon mem, la datreveno
De la naskiĝo mia, mi naskiĝis.
Messalo, vian manon, kaj atestu
Ke kontraŭvole mi, kiel Pompejo,
La tutan nian liberecon riskas
Per unu nur batal' : vi ankaŭ scias,
Ke mi aprobis plene l' opinion
De Epikuro ; miaj nunaj sentoj
De la antaŭaj diferencas ; ankaŭ
Al antaŭsignoj parte mi konfidas.
Dum nia iro el Sardiso, paro
Da grandaj agloj flugis sur la frontan
Standardon, kaj satiĝis per nutraĵoj
De la soldatoj manoj ricevitaj ;
Nin al Filippo ili akompanis ;
Hodiaŭ tamen ili malaperis,
Kaj korvoj, falkoj, milvoj anstataŭe
Rigardas superfluge nin malsupren,
Akiron preskaŭ certan : baldakeno
Iliaj ombroj ŝajnas, plej fatala,
Sub kiu kuŝas nia soldataro
Tuj pereonta.
Mes. Ne, ne kredu tion.
Kas. Nur parte : ĉar mi estas maltimema,
Danĝerojn ĉiujn preta kontraŭstari.
Bru. Tre bone, Lucilio.
Kas. Nobla Bruto,
Hodiaŭ al ni helpu la diaro,
Ke pacemuloj ni kunmaljuniĝu !
Sed, ĉar homar' ne konas l' estontecon,
Pripensu sorton eble plej malbonan.
Se ni hodiaŭ malsukcesos, tiam
La lastan fojon nun ni kunparolas :
Do, kion, Bruto, vi intencas fari ?
Bru. Laŭ la filozofio mem, per kiu
Mallaŭdis mi Katonon, ho Kassio,

Pri lia memmortigo, sen memfido
Mi pensas de la vivo mallongigi
La tempon estas ago de timulo,
Malbrava pri okazontaĵoj eblaj.
Mi do esperas ke, per pacienco
Armite, mi atendos la ordonojn
De tiuj potenculoj, kiuj ĉiam
De supre nin direktas.

Kas. Se ni tial
Batalon la venontan perdos, ĉu
Triumfokondukiĝon vi elportos
Senplende tra la Romaj stratoj ?

Bru. Ne,
Kassio : pensu ne, Romano nobla,
Ke Bruto en katenoj iros Romon ;
Tro da grandanimeco li posedas.
Hodiaŭ tamen finos l' entreprenon
Je la Idusoj martaj komencitan :
Ne scias mi ĉu ni rerenkontiĝos,
Ni prenu do eternan adiaŭon :
Kassio, por eterne nun adiaŭ !
Se ni rerenkontiĝos, per ĝojego
Ni feliĉiĝos, se ne prave donas
Ni unu al alia forpermeson.

Kas. Ho Bruto, por eterne nun adiaŭ !
Se ni rerenkontiĝos, ni ridetos ;
Se ne, konvenas, ke ni adiaŭas,

Bru. Antaŭen do. Se nur homaro povus
La finon de aferoj antaŭscii !
Sufiĉas tamen ke la tag' finiĝos,
Kaj ni la finon konos. Venu for ! [*Ĉiuj foriras.*

SCENO 2.—*La sama.*

La kampo de batalado.

Trumpetado. Venas BRUTO *kaj* MESSALO.

Bru. Messalo, rajdu, kaj ĉi tiujn donu
[*Donante paperojn.*
Al la legioj ĉe l' alia flanko.
Ekiru ĉiuj kune ; ĉar mi vidas
Iom da ŝanceliĝo je l' flankaĵo
De Oktavio, kaj trapuŝo vigla
Renversos ilin. Rajdu ; ili venu. [*Ambaŭ foriras.*

SCENO 3.—*Alia parto de la kampo.*

Trumpetado. Venas KASSIO *kaj* TITINIO.

Kas. Rigardu, Titinio, l' perfiduloj
Forkuras ! mi fariĝas malamiko
Al miaj ; tiu ĉi standardo estis
Portata malantaŭen ; la portinton
Tuj mortiginte mi de liaj manoj
Malhonoratan prenis la standardon.
Tit. L' ordonon ekbatali Bruto donis
Tro frue ; ekvenkante Oktavion,
Li tro rapide prenis la sukceson ;
Soldatoj liaj falis sur rubaĵon,
Dum Antonio ĉiujn nin ĉirkaŭis.

Venas PINDARO.

Pind. For, via moŝto, for, pli malproksimen ;
En viaj tendoj estas Antonio ;
Kassio nobla, malproksimen iru.
Kas. Ĉi tiu mont' sufiĉe malproksima
Sin trovas. Al mi diru, Titinio,
Ĉu la flamantaj tendoj estas miaj ?

Tit. Jes, via moŝto.
Kas. Do, pro via amo
Al mi, ĉevalon mian prenu; forte
Pikante lin per spronoj, rajdu, rajdu
Senĉese, ĝis vi estos alveninta
Al tiuj ĉi amasoj malproksimen,
Kaj estos vi ĉi tien reveninta,
Por ke mi vere sciu ĉu amikoj
Aŭ malamikoj ili estas.
Tit. Mi
Revenos pli rapide eĉ ol penso. [*Li foriras.*
Kas. Pindaro, supreniru tiun monton;
Mi vidas nur neklare; Titinion
Rigardu, kaj rakontu pri l' batalo.
[PINDARO *supreniras la monton.*
Ĉi tiun tagon mi l' unuan fojon
Ekspiris: kun la jar' la dat' rondiras;
La sama tag' komencon mian vidos
Kaj finon; vivo mia sian rondon
Plenumas. Kio nova, ho Pindaro?
Pin. (*De supre*). Ho via moŝto!
Kas. Kia do novaĵo?
Pin. (*De supre*). Spronantaj kavaliroj Titinion
Jen! ĉiuflanke pli kaj pli ĉirkaŭas.
Ne ĉesas li galopi: ho! rajdantan
Nun ili preskaŭ trafas lin. Antaŭen,
Ho Titinio! rajdu, Titinio!
Malsupreniras de ĉevalo kelkaj
Soldatoj: ankaŭ li malsupreniras!
Kaptita! aŭdu! ili ĝojekkrias.
Kas. Malsupreniru, ne rigardu plu.
Ĉu mi ankoraŭ vivas, malbravulo,
Vidinte mian karan kamaradon
Kaptatan antaŭ propraj mem okuloj?

PINDARO *malsupreniras.*

Mi petas, tien ĉi alproksimiĝu—
Mi kaptis vin, Pindaro, en Partio;

Kaj, post savado de la vivo via,
Mi vin ĵurigis ke, se ion gravan
Ordonos mi al vi, vi tion provos.
Plenumu vian ĵuron ; liberulo
Fariĝu : per ĉi tiu glavo, kiu
Disŝiris la inteston de Cezaro,
Trapiku mian bruston. Ne respondu :
Jen, prenu la tenilon ; kaj tuj kiam
Mi kovros la vizaĝon, kiel nun,
La glavon gvidu. [PINDARO *glave lin frapas.*
Vi venĝita estas,
Cezaro, eĉ per tiu glavo kiu
Mortigis vin. [*Li mortas.*
Pin. Mi do libera estas,
Sed tiamamere kontraŭvole.
Kassio, for de tie ĉi Pindaro
Forkuros, kie lin Roman' neniam
Observos. [*Foriras.*

Revenas TITINIO *kaj* MESSALO.

Mes. Estas nura interŝanĝo
De venkoj kaj malvenkoj ; ĉar l' armeon
De Oktavio Bruto ĵus disbatis,
Kaj Antonio tiun de Kassio.
Tit. Ĝojigos tiu ĉi novaĵ' Kassion.
Mes. En kia loko vi lin lasis ?
Tit. Tie,
Nekonsoleblan, kune kun Pindaro,
Neliberulo lia.
Mes. Ĉu ne tie
Ripozas li sur tero ?
Tit. Li ne havas
Ripozon de vivant'. Ho mia koro !
Mes. Ĉu ne ĝi estas li ?
Tit. Ne, tiu ĉi
Li estis, sed Kassio plu ne vivas.
Ho subiranta suno, kiel vi

Radioj inter ruĝaj mallumiĝas,
Tiel en mez' de sia ruĝa sango
Noktiĝis jam la tago de Kassio;
La Roma sun' subiris! Nia tago
Foriris; nuboj, rosoj, kaj danĝeroj
Alproksimiĝas; nia fin' ĉeestas!
Malkonfidemo pri sukceso nia
Ĉi tion faris.

Mes. Jes, ĉi tion faris
Malkonfidemo pri sukceso bona.
Ho vi, naskito de Melankolio,
Trompemo malbenita, kial vi
Al la sentemaj pensoj de homaro
Prezentas la malveron? Memtrompemo,
Vi maturiĝas ne ĝis la feliĉa
Naskiĝo, sed mortigas la patrinon,
Je vi gravedan!

Tit. Ho! he! Ho Pindaro!

Mes. Vi, Titinio, serĉu lin; mi iras
Renkonti noblan Bruton, por trapiki
La koron lian per raporto tiel
Fatala: mi ja diras, ĝin trapiki,
Car akra ŝtal', kaj sagoj venenitaj
Ne trafus pli maldolĉe lian koron,
Ol la rakont' pri tiu ĉi vidaĵo.

Tit. Rapidu do, Messalo, kaj mi dume
Pindaron serĉos. [MESSALO *foriras.*
Kial vi, Kassio,
Forsendis min? Ĉu mi amikojn viajn
Ne trovis? kaj ĉu ili mian frunton
Ne kronis per ĉi tiu laŭro, por
Ĝin al vi doni? Ĉu vi ĝojekkriojn
Ne aŭdis? kaj vi ĉion malkomprenis;
Ho ve! mi tamen tiun ĉi girlandon
Sur vian frunton metas; via Bruto
Al mi ordonis doni ĝin al vi
Kaj mi al li obeas. Bruto, venu,
Rapide,—vidu kiel mi estimas

Kassion. Dioj, kun permeso via—
Jen devo de Romano—nur per glavo
Kassia estas Titinia savo. [*Mortigas sin.*

Trumpetado. Revenas MESSALO, *kun* BRUTO, *Juna* KATONO, STRATONO, VOLUMNIO, *kaj* LUCILIO.

Bru. Li kie estas, ho Messalo bona?
Mes. Li tie; Titinio lin funebras.
Bru. De Titinio la vizaĝo supren
Rigardas.
Katono. Li jam mortis.
Bru. Ho Julio
Cezaro, vi ankoraŭ potencegas!
Spirito via vagas sur la tero,
Kaj kontraŭ niajn brustojn mem direktas
Eĉ niajn glavojn. [*Mallaŭta trumpetado.*
Katono. Brava Titinio,
Jen, li Kassion la malvivan kronis!
Bru. Ĉu nun ekzistas du Romanoj tiaj?—
Adiaŭ al la lasta el Romanoj!
Ĉar Rom' neniam povos naski iun
Al vi egalan. Mi, amikoj, ŝuldas
Al tiu ĉi mortinto pli da larmoj,
Ol vi min vidas pagi: mi, Kassio,
La tempon trovos, mi la tempon trovos.
La korpon tial sendu al Tasoso:
La funebrado lia ne en nia
Tendaro havos lokon, pro la timo
Ke ĝi nin malkonsolu. Lucilio,
Kaj vi, Katono, venu al la kampo.
Labeo kaj Flavio, ekbatalu:
Nun estas tria horo: je noktiĝo
Ni provos sorton en batiĝo dua. [*Ili foriras.*

SCENO 4.—*Alia parto de la kampo.*

Trumpetado. Venas, batalante, soldatoj el ambaŭ militistaroj, tiam BRUTO, *Juna* KATONO, LUCILIO, *kaj aliaj.*

Bru. Ankoraŭ, ho ankoraŭ, vi antaŭen,
Sampatrujanoj, frapu kuraĝege.
Katono. Eĉ malnobluloj ne rifuzus. Kiuj
Kun mi kuniros? Tuj mi nomon mian
Proklamos ĉie sur la kampo? Ho!
Mi estas propra fil' de Mark' Katono!
Severa kontraŭulo al tiranoj,
Kaj la amiko de patrujo mia:
De Mark' Katono mi la filo estas!
[*Atakegas la malamikojn.*
Bru. Mi estas Bruto, Marko Bruto mi!
Amiko de patrujo mia, Bruto!
Min konu kiel fortan batalanton!
[*Foriras, atakegante la malamikojn.* KATONO *falas.*
Lucil. Katono juna nobla, ĉu vi falis?
Vi mortis brave, kiel Titinio,
Kaj honorinde, filo de Katono,
Unua Sold. Ĉesigu la batalon, aŭ vi mortu.
Lucil. Mi ĉesas, sed kondiĉe ke mi mortu.
Jen oro, prenu ĝin, kaj min mortigu.
Mortigu Bruton, ke mortigo lia
Vin faru glora. [*Montrante monon.*
Unua Sold. Mi lin ne mortigos.
Ĉar li kaptito plej altranga estas.
Dua Sold. Ho, flanken. Diru vi al Antonio,
Ke ni kaptintaj estas noblan Bruton.
Unua Sold. Mi diros. Jen la generalo venas.

Eniras ANTONIO.

Kaptita estas Bruto, via moŝto.
Ant. Li estas kie?
Lucil. Li estas, Antonio, sendanĝera:
Certiĝu ke nenia malamiko

La noblan Bruton iam kaptos vivan :
Vi dioj, gardu lin de tia honto !
Ĉu vi lin trovos vivan aŭ malvivan,
Li estos Bruto tia, kia ĉiam.
  Ant. Amikoj, tiu ĉi ne estas Bruto.
Sed samvalora estas li ; lin gardu :
Kaj traktu lin aminde : mi preferas
Amikojn tiajn ol la malamikoj.
Esploru ĉu aŭ ne nun Bruto vivas ;
Kaj en la tend' de Oktavio lasu
Nin scii kiamaniere ĉio
Okazis. [*Ĉiuj foriras.*

SCENO 5.—*Alia parto de la kampo.*

Venas BRUTO, DARDANIO, KLITO, STRATONO, *kaj* VOLUMNIO.

Bru. Amikoj, solaj al mi nun restantaj,
Ripozu vi sur tiu ĉi ŝtonego.
Kli. La torĉan lumon Statilio montris,
Sed ne revenis; li kaptita estas,
Aŭ mortigita.
Bru. Vin sidigu, Klito.
Mortigo estas ago ĉiutaga,
Kaj estas nun en modo: aŭdu, Klito,
[*Parolante al li en la orelon.*
Kli. Ne, via moŝt', ne por la tuta mondo.
Bru. Silentu do.
Kli. Plivole mi min mem
Mortigus.
Bru. Dardanio, aŭdu. [*Parolante al li en la orelon.*
Dar. Kion!
Mi tian faron fari!
Kli. Dardanio!
Dar. Ho Klito!
Kli. Kian Bruto al vi faris
Nebonan peton?
Dar. Lin mortigi, Klito,
Rigardu, ĉar mien' de meditado
Surpasas liajn trajtojn.
Kli. Tiun vazon
Plej noblan kordolor' plenigis tiel,
Ke per okuloj liaj ĝi elfluas.
Bru. Ĉi tien, Volumnio; unu vorton.
Vol. Sinjoro, kion?
Bru. Aŭdu, Volumnio,
Du fojojn la spirito de Cezaro
Al mi aperis; foje en Sardiso,
Hieraŭ nokte sur Filippaj kampoj:
Mi scias, mia lasta horo venas.
Vol. Sinjoro, ne.

Bru. Mi sentas ĝin, amiko.
Vi vidas la progreson de l' milito;
La malamiko nin ĝis la infero
Rebatis: [*Mallaŭta trumpetado.*
decas pli ensalti tien,
Ol lasi al li nin en ĝin enpuŝi.
Vi scias, bona Volumnio, ke
Antaŭe ni du kunlernantoj estis:
Per tiu nia amo mi vin petas,
Subtenu mian glavon, dum mi ĝin
Surkuras.
Vol. Tia ne, sinjoro, estas
La rolo de amiko. [*Ankoraŭ trumpetado.*
Kli. For, via moŝto; tie ĉi restado
Ne estas plu senriska.
Bru. Volumnio,
Al vi adiaŭ; kaj al vi: kaj vi.
La tutan tempon vi, Stratono, dormis;
Al vi adiaŭ ankaŭ. Samlandanoj,
Mi ĝojas, ke dum mia tuta vivo
Amikon malfidelan mi ne konis.
Mi, per ĉi tiu malfeliĉa tago,
Akiros pli da glor' ol Antonio
Kaj Oktavio per malnobla venko.
Adiaŭ do; ĉar Bruta lango preskaŭ
Plenumis lian vivrakonton: nokto
Okulojn miajn premas; miaj ostoj
Ripozi volas, klopodinte nur
Ĉi tiun horon por atingi,
[*Trumpetado. Krioj post la sceno,* "*For! for! for!*"
Kli. For, via moŝt'!
Bru. Antaŭen! mi tuj sekvos.
[KLITO, DARDANIO, *kaj* VOLUMNIO *foriras.*
Stratono, restu apud mi, mi petas;
Vi estas estiminda: via vivo
Ne senbonfama estas: mian glavon
Subtenu, forturnante la vizaĝon,
Dum mi surkuras ĝin. Ĉu vi ne volas?

Stra. La manon donu do. Nun, via moŝto,
Adiaŭ.
Bru. Ho Stratono, nun adiaŭ.
[*Surkuras sian glavon.*
Cezar', ripozu; mi ne vivon vian
Forprenis pli bonvole, ol la mian. [*Mortas.*

Trumpetado. Returnmarŝo. Venas OKTAVIO, ANTONIO, MESSALO, LUCILIO, *kaj la militistaro.*

Okt. Ho! kiu estas tiu?
Mes. De mia mastro la servanto. Kie,
Stratono, estas via mastro?
Stra. Tute
Libera, ho Messalo, de l' sklaveco
En kiu vivas ĉiuj terloĝantoj:
Kaj, faru la venkintoj ĉion eblan,
Lin povos ili nur bruligi; gloron
Neniu gajnos pro la morto lia.
Lucil. En vivo kaj en morto Bruto pruvis
Sin ĉiam nobla: Bruto, mi vin dankas.
Okt. Volonte mi de Bruto la servintojn
Fidelajn kiel miajn proprajn varbos.
Ĉu vi konsentas, ke mi vin enskribu
En mian servon, ho Stratono bona?
Stra. Se min Messalo volas rekomendi.
Okt. Messalo brava ĝoje tion faros.
Mes. Rakontu, kiel mia mastro mortis,
Stratono bona.
Stra. Certe, lian glavon
Mi tenis, kaj li brave ĝin surkuris.
Mes. Lin, Oktavio, prenu; li la lastan
Por mia kara mastro servon faris.
Ant. Li estis la plej nobla el Romanoj:
Krom li, la konspirantoj sian faron
Plenumis pro ĵaluzo al Cezaro;
Li sola iris en iliajn vicojn
Kun sincereco, kun la sola penso
Al la komuna bono, kaj profito;

Esence pura estis lia vivo,
Kaj tiel bone estis ordigitaj
La ecoj de ĉi tiu ekzistaĵo,
Ke tuta kreitar' fiere povus
Proklami ĉien: "Tiu estis viro!"
Okt. Ni lin honoru, kaj ni lin funebru
Laŭ la meritoj de indeco lia.
Ni ne avaru ĉiujn plej konvenajn
Ceremoniojn kaj funebrajn morojn.
Ripozu lia korp' hodiaŭ nokte,
En mia tendo, kun vestaĵo nobla
Kaj la armiloj de la batalantoj.
Alvoku ni l' amason sub tendarojn:
Kaj ni disdonu inter ni l' akiron
Gloregan de ĉi tiu bela tago.

CHATHAM:
W. & J. MACKAY & CO., LTD.

LIST OF ESPERANTO BOOKS

which can be obtained from the BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, 13, Arundel Street, Strand, W.C.

INSTRUCTION BOOKS.

	PRICES, POST FREE s.	d.
Student's Complete Text-Book, by Dr. O'Connor, M.A.	1	8
Grammar & Exercises of Esperanto, by Beaufront & Geoghegan	1	7
Dr. Zamenhof's Ekzercaro, with translation by Joseph Rhodes ..	1	0
—— Fundamento de Esp. (Gramatiko, Ekzercara kaj Universala Vortaro) .. .. .. cloth	3	0
Esperanta Sintakso, by P. Fruictier (in Esperanto)	1	6
Thirty-six Exercises, with key, by A. Motteau	1	4
La Tutmonda lernolibro por paroligi Esp., de F. L. G. Maréchal, B.A.	1	0
Lessons in Esperanto, appearing in Cassell's Popular Educator, by G. W. Bullen	0	7
Primer of Esperanto, by Dr. O'Connor, M.A.	0	2
Kurso Tutmonda de Esp., laŭ la metodo natura, by E. Gasse ..	0	9
Instruado per bildaro	0	3
Notions élémentaires de Esp., Th. Cart .. .. Pt. I. 2d., Pt. II.	0	2
First Lessons in Esperanto, by Th. Cart & Joseph Rhodes ..	0	7
Do. do. in French, German, Italian, Spanish, Portuguese, Bulgarian, Dano-Norwegian and Dutch (each)	0	7
Commentaire sur la Grammaire Esperanto, by L. de Beaufront (in French)	2	0
Strukturo de l'vortaro Esperanta, by L. Beaufront (Fr. and Esp.)	0	4
Ekcercoj de Aplikado, by L. de Beaufront (in Esperanto)	1	0
Texte Synthétique, by L. de Beaufront (French and Esperanto) ..	0	6
Frazlibro de la Turisto, in six languages	0	6
Komercaj Leteroj, by Lambert	0	6
La Komerca Secretario, verkita de Johano Ros Sudria	0	6
Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel ..	1	4
Braille Instruction Books for the Blind (English or French)	4	6
Esperanto Text-Books, in Russian, Polish, Swedish, Finnish, Hungarian, Bohemian, Icelandic, and other languages, to order		
Resumo de esperanta stenografio (sistemo Stolze-Schrey) by Schneeberger	0	3
Lernolibro de Esp. Stenografio, by Schneeberger	1	0
Esperanta Fonografio, alfarado de Pitman's Shorthand, by A. W. Lyndridge	1	1
Grammatical Questions in Esperanto, as set for Advanced Correspondence Ex.	0	3

DICTIONARIES.

	s.	d.
Esperanto-English, by A. Motteau	2	8
English-Esperanto, by Dr. O'Connor, M.A., and C. F. Hayes ..	1	8
The two vols. strongly bound in cloth	5	3
Pocket Vocabulary	0	1
Universala Vortaro, Esperanto root-words, with translations in French, English, German, Russian & Polish, by Dr. Zamenhof	1	0
Dictionnaire Esperanto-Français by L. de Beaufront	1	6
Vocabulaire Français-Esperanto & Esperanto-Français, by Th. Cart	2	6
Grand Dictionaire Français-Esperanto, by Presa Esp. Soc.	14	0
Do. separate numbers	0	7
Wörterbuch Esperanto-Deutsch, by H. Jürgenson & Pagnier ..	2	2
Do. Deutsch-Esperanto do. do. ..	2	2
Vortaro de Esperantaj Rimoj, by J. Rhodes, F.J.I.	0	7
Esperanta Versfarado, de J. Parisot & Th. Cart	0	4
Tutmonda jarlibro Esperantista, 1905 or 1906 (appears in May each year)	2	6
Matematika Terminaro kaj Krestomatio, by Raoul Bricard ..	0	9

LITERATURE.

	s.	d.
Fundamenta Krestomatio, a collection of prose and poetry, edited by Dr. Zamenhof, the standard guide for style in Esperanto (paper)	3	6
Do. strongly bound in cloth	4	6

LIST OF ESPERANTO BOOKS—*Continued.*

	s.	*d.*
Kondukanto de l' interparolado kaj Antologio, by A. GRABOWSKI ..	2	0
Esperantaj Prozaĵoj, prose pieces by the best authors	2	6
Do. bound	3	0
Diversaĵoj, stories translated by various writers	1	6
Hamlet, of Shakespeare, translated by Dr. ZAMENHOF	2	0
La Ventego ("Tempest"), of Shakespeare, by A. MOTTEAU (cloth)	2	1
Si Kliniĝas por venki (Goldsmith's "She Stoops to Conquer") by A. MOTTEAU	2	2
Eneido de Virgilio, kanto I. and II., translated by D-ro VALIENNE ..	0	7
Paĝoj el la Flandra Literaturo, translated by D-roj SEYNAEVE and MELCKEBECKE	1	6
L' Avarulo, of Molière, translated by SAM. MEYER	0	9
Monadologia, of Leibnitz, translated by E. BOIRAC, Univ. of Dijon	0	7
Vojaĝo interne de mia ĉambro, of X. le Maistre, trans. by SAM. MEYER	0	9
La Fundo de l' Mizero, of V. Sieroŝevski, trans. by KABE	0	9
Advokato Patelin, of Brueys and Palaprat, transl. by J. EVROT ..	0	9
Edziĝo Kontraŭvola ("Le Mariage forcé" de Molière), translated by V. DUFFENTREL	0	7
La Supujo, Comedy, trans. by SAM. MEYER	0	4
Perdita kaj Retrovita, by E. BOIRAC	0	7
Paŭlo kaj Virginio, trans. by H. HODLER	1	3
Sep Rakontoj de Ivan Malfeliĉulo	1	0
Rolandkanto, trans. by Dr. NOEL	1	6
Ruĝa floro, de V. GARSIN	0	4
Homa Doloro, poemo orig. de FEZ	0	4
Fabeloj kaj Rakontoj (el *Esperantaj Prozaĵoj*)	0	3
Kristnaska Sonorado (Christmas Carol of Dickens), by Dr. M. WESTCOTT	1	1
Kain, of Byron, translated by A. KOFMAN (rare)	1	6
Kelkaj floroj Esperantaj. WITTERYCK. I. & II. .. ..(each)	0	3
Cikado ĉe Formikoj, by LABICHE and E. LEGOUVE	0	7
Elektitaj Fabeloj, of Lafontaine, trans. by G. VAILLANT	0	9
Rakontoj pri feinoj, of C. Perrault, trans. by S-ino SARPY (for children)	1	0
La Kolorigisto-aerveturanto, trans. by the MONACO GROUP	0	4
Majstro Jan Hus (Life of John Hus), by J. F. KHUN	0	10
Tutmondaj fajrokutimoj. H. W. SOUTHCOMBE	0	3½
Proverbaro Esperanta, aldono al Frazeologio, Rusa, Pola, Franca, Germana, de M. F. ZAMENHOF, la Kajero	0	7
Cloth Case for binding *The British Esperantist*, lettered on back and side	0	6

(Continued on page 4.)

To the Secretary of—

The British Esperanto Association,

13, ARUNDEL ST., STRAND, LONDON, W.C.

Please enrol my name as a MEMBER *of the* BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION. *I enclose the sum of 5s. for the first year's Subscription.*

Name.. *Miss or Mrs.*

Address..

....

Also please enrol my name, free of charge, in the *Tutmonda jarlibro Esperantista* and *Adresaro.*

LIST OF ESPERANTO BOOKS—*Continued.*

FOR PROPAGANDA.

	s.	d.
The Esperanto Language (practically considered), by R. J. LLOYD, D.Lit., M.A. .. .. 9s. dozen	0	10
Do you Know Esperanto? One dozen, 1s. .. .. per 100	5	6
Esperanto Keys, by E. Ĉefeĉ, now ready in English, German, French, Italian, Swedish and Spanish, 6d. dozen .. .. per 100	3	0
Propaganda Leaflets, with B.E.A. address and without per 100	1	0
L'Esperanto, seule vraie solution de la langue internationale auxiliaire, par L. DE BEAUFRONT	0	2
Star-shaped Badges	0	9
Histoire de la langue universelle, COUTURAT & LEAU	10	0
Extraits de l'Histoire de la langue universelle, COUTURAT & LEAU	1	0
Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina? By L. DE BEAUFRONT (French and Esperanto)	0	7
Propaganda Postcards, two kinds .. .. per 100	1	1
Posters for Lectures, double crown ("B. E." cover design enlarged) each	0	1

HAMLETO.

(Shakespeare's "HAMLET").

Translated by D-ro L. ZAMENHOF.

Post Free. Paper, 2s. 0d. Cloth, 2s. 6d.

LA VENTEGO.

(Shakespeare's "Tempest"),

Translated by A. MOTTEAU.

Cloth, 2s. 0d. Post Free, 2s. 1d.

JULIO CEZARO.

(Shakespeare's "Julius Cæsar").

Translated by D. H. LAMBERT, B.A.

Cloth, 1s. 6d. Nett. *(In the Press.)* **Post Free, 1s. 7d.**

To be published by THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

To the Secretary of—

The British Esperanto Association,

13, ARUNDEL ST., STRAND, LONDON, W.C.

Please supply me with ....copies of THE BRITISH ESPERANTIST *at the rate of (3s. or 1s. 6d.) ...., from........to........, 190..., for which I enclose the sum of......*

Name .... *Miss or Mrs.*

Address..

....

Also please enrol my name, free of charge, in the *Tutmonda jarlibro Esperantista* and *Adresaro.*